




HUNGARA VIVO

6

1976

8.- Ft

CHINOIN GÉPGYÁR



fabrikas maŝinojn taŭgajn por strikta pakado
de individuaj kaj kolektivaj pakadoj
Se vi havas tiurilatan interesiĝon bonvolu kontaktiĝi kun

HUNICOOP Gépipari Kooperációs Külkereskedelmi Iroda

Maŝinindustria Koopera Kontoro por Internacia Komercio
Ĝi estas volonte je via dispono:

HUNICOOP

HUNICOOP

H—1062 Budapest, Népköztársaság útja 113.
Telefon: 424-950
Telex: 22-4435

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio

Adreso: H—1081 Budapest

VIII. Kenyérmező u. 6.

Poŝta adreso: H—1368 Budapest

Pf.: 193.

Aperas dumonate

XV. jaro 1976. 6-a numero

Numero pri la E-a traduko

ENHAVO

Benczik, V.: Esperanta tradukarto	1
Poemtradukaĵoj	6
Prezento de Márton Fejes	7
Kalocsay pri la tradukarto	8
Benedek, Elek: La maljunulino kaj la morto (Tr. M. Benczik)	9
Tamkó Sírátó, K.: Enkonduko en la militsciencon (T. M. Fejes)	9
Literatura metiejo	11
Szabó, M. R.: Revuo de revuoj	13
Letero al Gyula Ortutay (Tr. —vhzs—)	14
A. H.: Nova eldonaĵo omaĝe al Kalocsay	15
Gergely, M.: Arto de Csontváry	16
Bálint, Sz.: Panoramo	18
László, F.: Medioprotektado — monda problemo (Tr. A. Pechan)	
Tóth, Endre: Lappar, la Antikristo	26
Tófalvi, É.: Intervjuo de Romeš Candra al PACO	29
Paĝo de FERI'	30
Kalendaro, Ŝalko, Ŝakanektodoj	31

Sur la titolpaĝo — Csontváry:
La soleca cedro

Estas bonŝance, ke Esperanto estis kreita en Meza Eŭropo, kie la ebleco de la literatura tradukado estis neniam serioze pridubita, cetere la modesta pola okulisto certe ne kuraĝus inkluzivi en la *Unua Libro* de sia lingvo poemtradukon el la *Lirika Intermezo* de Heine. Sed tiu paŝo estis farita, kaj per tio la literatura tradukado — precipe la poezia — komencis iĝi unu el la plej gravaj faktoroj de evoluigo de la Internacia Lingvo.

Eĉ en la *Dua Libro* ne mankas literaturaj tradukoj, kaj tiu persisto de Zamenhof baldaŭ trovis imitantojn: jam en 1888 aperis kiel aparta broŝuro *La neĝa blovado* de Puŝkin en la traduko de Antoni Grabowski, kiun sekvis en 1889 *La Geŝtatoj* de Goethe fare de la sama tradukisto. Grandan impulson donis al tradukprovoj la apero de *La Esperantisto* en 1889. En la dua numero aperas denove tradukaĵoj el la plumo de Grabowski, kaj post tio apenaŭ oni trovas iun numeron de la revuo sen literaturaj tradukaĵoj. Krom Zamenhof kaj Grabowski aktivas en tiu tempo ĉefe Kofman, E. de Wahl, Devjatnin, Meier kaj Goldberg.

Ekestas la demando, kial tiuj unuaj adeptoj de Esperanto oferis tempon por tiu laboro? Sendube inter la kaŭzoj oni trovas ankaŭ la deziron ekzerci sin en la nove lernita lingvo — kiel Grabowski mem konfesas en antaŭparolo al *La neĝa blovado* — tamen, jam en tiu tempo sufiĉe forte funkciis la deziro evoluigi la lingvon. Ke la tradukintoj — inter kiuj elstaris Zamenhof kaj

Grabowski — faris ĉion por publikigi siajn verkojn, bone pravas la porpublika destino de tiuj.

La unua iom longa traduko en Esperanto estis la romaneto *La batalo de l' vivo* de Dickens, tradukita de Zamenhof mem el la germana. Ĝi aperis en daŭrigoj sur paĝoj de *La Esperantisto* en la jaro 1891, sed nur en 1910 eliris libroforme.

Estis la jaro 1894, kiam apero de tradukita literatura verko farigis gravega movadhistoria evento. Temas pri la Zamenhofa *Hamleto* de Shakespeare, ĝuste kiam Esperanto travivis la unuan krizon de sia ekzisto. En tiu ĉi jaro la adeptoj de la Internacia Lingvo voĉdonis pri diversaj reformproponoj, por evantuale plitaŭgigi Esperanton. Venkis la partio kiu rifuzis ĉian reformon, kaj la esperantlingva traduko de tiu ĉefverko de la monda literaturo kvazaŭ pravigis la rezulton de la voĉdono: lingvo, kiu kapablas redoni la sencnuancojn de Ŝekspira verko, tute ne bezonas bazajn reformojn.

La Zamenhofa *Hamleto* fakte havis triumfan vojon dum la postaj okdek jaroj: ĝi aperis en multaj eldonoj, kaj nur en la sesdekaj jaroj retradukis ĝin L. N. M. Newell. Filologoj foruzis multan inkon analizante ĝin, demonstris multajn ĝiajn malvirtojn — interalie, ke Zamenhof tro ofte konsultis germanan tradukon anstataŭ uzi nur la anglan originalon — tamen ĝia longtempa populareco ne ŝuldiĝas nur al la fakto, ke ĝin tradukis la kreinto de la lingvo. Tiu traduko — eble ne ĉiuloke sencfidela kaj nuancriĉa



Károly Reich: Printempo

— havas lingvaĵon vivan, naturan, pri kio atestas ankaŭ ĝia sursceneja sukceso.

Frua florado

Post la malfacila, tamen sukcesa praa periodo (1887—1895) la tradukarto komencis disvolviĝi post ekaktivado de la eldonejo

Hachette. En 1901 Zamenhof subskribis kontrakton kun tiu eldonejo, kaj lia posta vasta traduklaboro fakte baziĝis sur la relative bonaj cirkonstancoj, kiujn kreis por li tiu kontrakto. Plian impulson al la Esperanta tradukarto donis *La Revuo*, kiu aperis de 1906, kaj dum ok jaroj donis eblecon por publikigo al la plej bonaj tradukistoj.

Krom la Zamenhofaj tradukoj — inter kiuj elstaras la *Malnova Testamento* — en tiu periodo aperas *La Faraono* de B. Prus, tradukita de Kabe, pluraj verkoj de Shakespeare, sennombraj tradukoj el la rusa kaj pola literaturoj. Aperis ankaŭ la kompleta *Eneido* (*Eneado*) de *Vergilio*, en la traduko de H. Valliene: tiu traduko vekis iomajn diskutojn, ankaŭ en la *Enciklopedio* oni trovas du malsamajn opiniojn pri ĝi, el la plumo de *Waringhien*, resp. de *Butler*.

Oni povas konstati, ke ĝis la unua mondmilito la Esperanta tradukarto superis la infanaĝajn mispaŝojn mallertaĵojn kaj atingis sian junageon. La plej valoraj kontribuoj de tiu epoko ŝuldiĝas nepre al tri poloj: Zamenhof, Grabowski kaj Kabe. Ili tamen ne iris la saman vojon. Zamenhof laboris ĉiam ege celkonscie por evoluigi la literaturan lingvon de Esperanto, eĉ ĉe elekto de la tradukotaj verkoj influis lin unuavice la bezonoj de la lingvo, kaj ne sia prefero. Li estis kuraĝa noviganto, enkondukis multajn neologismojn, aŭdacajn frazkonstruojn, kaj neniam evitis la malfacilaĵojn de la originala verko.

Grabowski

Multe simila estis la sinteno de Grabowski, kiu same emis alfronti malfacilegajn taskojn, tamen lia traduka verkaro ne havas tiel emfaze lingvoservan karakteron, kiel tiu de Zamenhof. La tradukaj taskoj tute ne subpremis lian individuecon, kontraŭe, li sentis sin verdstelana konkeranto de la mondliteraturo. Lia internacia antologio, *El Parnaso de Popoloj*, tradukita el 33 lingvoj, inkluzive el la hungara (aperinta en 1913), ne nur demonstras la grandegajn eblecojn de la Esperanta tradukarto, sed ankaŭ heroldas la naskiĝon de tradukartista individueco, kio estis havonta atentindajn postsekvojn en nia literaturo. La alia ĉefverko de Grabowski, la epopeo *Sinjoro Tadeo* de Adam *Mickiewicz* aperis en 1918 kaj fine de la kvindekaj jaroj denove.

La tradukinto de *La Faraono*, Kabe, iris alian vojon; lia verkaro havis aliajn atingajojn, kiuj ne estis malpli utilaj ol tiuj de liaj kolegoj. Li tradukis ekskluzive prozon, kaj lia idealo ne estis nepra venko de la malfacilaĵoj, kiujn prezentis la originalo, sed livero de klara, facilflua, naturefakta Esperanta teksto. Tiu tradukprincipo nuntempe eble efikas neserioza, tamen, lia agado multe kontribuis al elformiĝo de la elegante Esperanta proza stilo. Liaj tradukitaj prozaĵoj tre probable legis multajn esperantistojn, kiuj ne kuraĝus post la kurso tuj alfronti *Hamleton* aŭ la epopeon.

De Faŭsto ĝis La Trayedio

Kompreneble, krom la menciitaj tri tradukistoj, aktivis multegaj, kies verkaron ĝis nun ni ne bone aŭ apenaŭ konas, do serioza studado de la fruaj tradukoj certe rivelus ne unu agrablan surprizon. Tia surprizo okazis en 1958, kiam en *Belarto* estis repesita fragmento el *Faŭsto*, traduko de Boris Mirski, rusa esperantista poeto (mortinta en 1919). En la praa periodo pruviĝis, ke la lingvo principe taŭgas por uziĝi kiel beletra tradukilo. La vera disvolviĝo kaj firmiĝo de la konkeritaj rezultatoj ekas en 1901, (kontrakto de Zamenhof kun eldonejo *Hachette*), kaj tio daŭras disfloure ĝis 1914, — kaj kun malpli da vervo, — ankaŭ dum la milito.

La du ĉefaj motivoj de tradukado dum tiu periodo estis la deziro evoluigi la lingvon kaj propagandi ĝin per ili. La esperantistoj volis havi ĉiujn ĉefverkojn de la monda literaturo, ankaŭ por havi argumenton en sia propagando: ofte aperis nur mallongaj fragmentoj el iuj verkoj, tamen en la librolistoj povis figuri la titolo de la koncerna ĉefverko (ekz. *Don Kihoto*). Krom la vaste konataj ĉefverkoj oni tre

multe tradukis romantikajn verkojn el la 19-a jarcento, kiuj — apartenantaj al la naciistoria romantika tendenco — ne povis esperi pri vasta internacia interesiĝo; tiuj tradukoj verŝajne okulumis unuavice al la publika opinio de la koncerna lando, kaj nur duavice al la internacia esperantistaro. Tio ne nepre estis celkonscia intenco, ja oni ne preteratentu la nekapablon de multaj tradukistoj por internacia kultura pensmaniero: verŝajne ili ne bone povis distingi inter valorajoj en nacia kaj internacia skaloj. Cetere la persona prefero de la tradukistoj — eĉ, tiu de gvidantoj de naciaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj tre ofte funkciis kiel eldonejoj! — same multe influis la elekton de la tradukotaj verkoj. Interalie, pro tio aperis ĝis nun en Esperanto multaj verkoj triarangaj, tamen foje-foje en maladekvate elstara traduko.

La ora epoko

Kiel en la originala literaturo la apero de *Preter la vivo* kaj *Mondo kaj koro*, same sur la traduka kampo efikis revolucie la unuaj tradukoj de *Kalocsay*, ĉefe *La Tragedio de l' Homo* de Imre *Madách* (1823—1864), publikita en 1924. (Duan fojon, fakte retradukita, ĝi aperis en 1965.) Tiu verko estis la uverturo de la traduka florado, kiu daŭris ĝis la jaro 1939. Estas malfacile karakterizi la signifon, kiun havis en la Esperanta tradukarto la Buda-peŝta Skolo, antaŭ ĉio Kalocsay kaj la revuo *Literatura Mondo*.

Kalocsay sekvis la vojon komencitan de Zamenhof kaj Grabowski: li serĉis taskojn ĉiam pli malfacilajn por la lingvo kaj por si mem. Precipe Grabowski inspiris lin multe: pri tio atestas krom la multaj tiutemaj personaj konfesoj la poezia antologio *Eterna bukedo*, tradukita el 22 lingvoj — aperinta en 1931 — kies parenceco kun *El Parnaso de Popoloj* estas evidenta. Kalocsay

estis renesanctipa, multflanka erudiciulo, kun vastega, okcidentema kulturo: tia liberalburĝa fenomeno ne estis malofta en la tiutempa hungara kulturo. Tiu spirito klarigas liajn elektojn: *Romaj Elegioj* kaj *Taglibro* de Goethe (1932), *Infero* de Dante, kaj ankaŭ la enhavon de la antologio.

Eterna bukedo

Kalocsay multe kontribuis al la progreso de la Esperanta tradukarto ankaŭ kiel teoriisto: li normigis la Esperantan versfaraĵon, sen kio la plua evoluo praktike maleblis. La normoj, starigitaj de li, plene establiĝis, kaj nuntempe fakte neniu povas ektraduki poemon al Esperanto, kiu ne trastudis zorge *Parnasan Gvidlibron* aŭ almenaŭ la koncernajn eseojn en *Lingvo—Stilo—Formo*. Li intimigis ankaŭ multajn versformojn en Esperanto. La teoria laborado de Kalocsay ne ĉesis ankaŭ post la dua mondmilito: en tiu tempo li ellaboris adekvatan metrikon por esperantigo de klasikaj versformoj, interalie por heksametro. (Vidu: *La klasika metriko kaj Esperanto*; *La Nica Literatura Revuo*, n-ro 23—26.)

Sed estus maljuste forgesi pri la granda aro da diversnaciaj tradukistoj, kiuj publikigis en *Literatura Mondo*, kies naciaj numeroj — kiel ankaŭ la naciaj antologioj, aperintaj ĉe la sama eldonejo — estas vera trezorejo. Inter ili elstaras Hilda *Dresen*, Nikolao *Kurzens*, Lajos *Tárkony* (*Totsche*), Gaston *Waringhien*, Leo *Belmont*, Magda *Carlsson*; oni povas aserti, ke *malbona* traduko neniam publikiĝis en la revuo, nek en la libroj, aperintaj ĉe la eldonejo.

Kompreneble la Esperanta tradukarto, malgraŭ la supereco de *Literatura Mondo*, ne reduktiĝis je ties rondo. Dum la intermilita periodo aperis sennombraj tradukoj en diversaj landoj, sed nur malmultaj el ili povis konkuren-

ci kvalite kun tiuj, kiuj iel estis ligitaj ĉu al la eldonejo *Literatura Mondo*, ĉu al ties kunlaborantaro.

Se ĝis la jaro 1920 pruviĝis la kapablo de Esperanto funkcii kiel literatura tradukilo, kaj firmiĝis la rezultoj atingitaj sur la traduka kampo, en la intermilita tempo pruviĝis, ke Esperanta traduko povas atingi, eĉ superi la ĝeneralan nivelon de la nacilingva literatura tradukarto en Eŭropo. En tiu periodo fakte Esperanto pruvis ĉion pruveblan kaj pruvindan sur tiu kampo. Tio ŝuldiĝas al du faktoroj: unue, ke la intermilita centro de la Esperanta literaturo kreiĝis en Meza Eŭropo, en Hungario — lando, kie la tradukarto (ĉefe poezia) estis rigardata egalranga kun la originala kreado; kaj due, ke en tiu favora kultura atmosfero troviĝis persono kun mirinda talento kaj konsterna laboremo: Kálmán Kalocsay. La motivoj de la elekto de tradukotaj verkoj fariĝis pli subtilaj, ol ili estis pli frue; ili baziĝis jam plej ofte sur intima anima parenceco inter la originala aŭtoro kaj la tradukisto.

Ĝis la unua mondmilito la tradukarto restis preskaŭ ekskluziva manifestiĝo de literatura agado en Esperantio. Inter la du mondmilitoj ĝia florado okazas jam apud la potenca disvolviĝo de vasta originala kreado. La tradukarto havas ankoraŭ hegemonion, tamen, sur la paĝoj de *Literatura Mondo* jam fulmas diskuto pri la primareco inter la du branĉoj.

En la tria periodo

La milito haltigis la promesplenan evoluon, sed ne povis rompi ĝin. La Esperanta tradukarto post la dua mondmilito atingis disvolviĝon pli frue neimageblan, kvante kaj kvalite. La stila kaj

versfarada normaro, ellaborita dum la intermilita periodo, tute ne perdis sian validecon kaj efikforton. Firmiĝis la kontinuecon ankaŭ la reapero de *Literatura Mondo*, sur kies paĝoj en tiu ĉi periodo plimultiĝis tradukoj el la rusa kaj aliaj Orient-Eŭropaj literaturoj. La meza nivelo de la tradukoj ege altiĝis, kaj la nombro de personoj, kapablaj krei bonajn poemtradukojn, multobliĝis dum la pasintaj tri jardekoj. Malfacilas nombri eĉ la tradukajn ĉefverkojn de tiu periodo.

Kalocsay plu aktivas: menciindas el lia verkaro *La Floroj de l' Malbono de Baudelaire* (ĉefe kun *Waringhien* kaj *Tárkony*), *Kantoj kaj Romancoj de Heine* (kun *Waringhien*), tri *Ŝekspiraj dramoj*, retraduko de la drama poemo de Madách kaj *Libero kaj amo de Petőfi*. Sed venis multaj aliaj verkoj: *Angla Antologio* (ĉefe *Auld* kaj *Reto Rossetti*), *Kalevala* (*Leppäkoski*), *Otelo de Shakespeare* (*Reto Rossetti*), *Peer Gynt* de Ibsen (*Haugen*), *Reĝo Edipo* kaj *Antigona* de Sofoklo (*Gregor*), *Cigana Romanco* de Federico Garcia Lorca (*Fernando de Diego*), *Bone!* de V. V. *Majakovski* (*K. Gusev*), *La bapto de caro Vladimir* de *Borovský* (*T. Pumpr.*)

Aperis pluraj bonegaj tradukoj el la japana lingvo: inter la tiulandaj tradukistoj elstaras *Miyamoto Maŝao*. Menciindas ankoraŭ la kellofoje brilaj tradukoj de *Dao Anh Kha* el la vjetnama kaj la esperantigo de la epopeo *Aŝma* en la plenumo de *Laŭlum*.

Respektinda listo. Kaj tiuj efektive estas nur ĉefverkoj, kiuj grave superas la ĝeneralan nivelon de la tradukarto eĉ en Meza Eŭropo; la nombro de bonaj kaj precizaj

tradukoj, kiuj havas tiun nivelon, estas multe pli granda.

Prozaj tradukoj

Ĝis nun relative malmulte estis tuŝitaj en tiu ĉi artikolo la prozaj tradukoj. Ties kvanta proporcio estas ne neglektinda en nia traduka literaturo, kvankam iom malpli granda, ol en naciaj lingvoj. Tio havas pezan kaŭzon: nome, la prozaj tradukoj postrestis al la poeziaĵoj sur la kampo de la evoluigado de la literatura lingvo. Tiu fakto ne devenas sole el la originala diferenco inter poezio kaj prozo, sed ankaŭ el la malpli alta arta nivelo de la Esperanta proza tradukado.

La kaŭzon de la niveldiferenco ni devas serĉi samloke, kiel tiun de la niveldiferenco inter originala poezio kaj prozo: nome, ke necesas malpli da tempo por traduki soneton, ol romanon. Malofte homoj vere talentaj povas kaj pretas sin dediĉi al tradukado de longaj prozaĵoj. Tamen, esceptoj ekzistas. Tia escepto estis en la fruaj jaroj *Kabe*, inter la du militoj *Stellan Engholm* kaj *Ivo Rotkviĉ*, en kies traduko la mezkvalita romano *Cezaro* de M. *Jelusiĉ* fariĝis — almenaŭ stile — ĉefverko. Memorinda estas el tiu tempo la traduko de la novelo *Mitologio* de M. *Babits* plenumita de L. *Tárkony* (*Totsche*), kaj ankaŭ la elhungaraj prozaj tradukoj de K. *Bodó*.

La rolo de *Literatura Mondo* estis elstara ankaŭ sur kampo de la proza tradukarto: ĉi tie establiĝis la normo, ke tradukisto devas liveri laŭeble artisman, sed almenaŭ stile korektan Esperantan tekston. Kaj la proza traduko fakte ĝis nun ne superis tion: la kontrolo de lingva kaj stila precizeco de la traduko — kaj la stila

kontrolo fare de sperta alilingva esperantisto — tute ne fariĝis ankoraŭ kutimo. Kaj ankoraŭ ne formortis la ĝenerala supozo, ke la proztraduka kampo estas libere alirebla por ĉiu uzanto de Esperanto, kiu sopiras je literaturaj laŭroj...

Pro tio la atutaj prozaj tradukoj de la postmilita periodo estas esceptoj, kaj ligiĝas al la nomo de kelkaj talentuloj, kiuj konscias pri la diferenco inter komuna lingvo kaj la lingvaĵo de la beletra prozo. Tiaj estas ekzemple la proza parto de la Angla Antologio kaj la elhispanaj tradukoj de Fernando de *Diego*. Krome iom post iom multiĝis la nombro de artaj prozaj tradukoj ankaŭ en la diversaj revuoj, precipe el la plumo de *Auld*, de *Tárkony*.

Tamen, estas gravega diferenco inter la roloj, kiujn ludis la poezia kaj la proza tradukarto en la Esperanta literaturo. La elastan kaj riĉan poezian lingvaĵon, kiun ni havas, almenaŭ du-trione ni ŝuldas al la poezia tradukarto; la originala poezio efike ekkontribuis al tiu evoluo nur post la dua mondmilito.

Pri la Esperanta beletra proza stilo entute ne eblas diri, ke ĝi estas elasta kaj riĉa: ĝi meritas maksimume la epitetojn *preciza* kaj *eleganta*. Ŝajne la tradukarto ne povas fari la bezonajn plujajn paŝojn: ĉi-kampe necesas pluri la vojon, kiun komencis kelkaj originalaj verkistoj, ĉefe *Ribillard*, *Francis* kaj *Rosbach*.

Nuntempo kaj estonto

En la tria periodo de nia literaturhistorio la proporcia pezo de la tradukarto plu malkreskis je la gajno de la originalaj verkoj, tamen ĝi ankoraŭ havas hegemoni-

on: konsiderinda parto de esperantistoj eĉ nun emas vidi en ĝi la ĉefan aspekton de la internacilingva kulturo.

La tradukarto fakte havis tri ĉefajn taskojn en nia kulturo. La *unua* estis evoluigi, riĉigi la lingvon kaj pruvi, ke Esperanto kapablas funkcii kiel belarta tradukilo, eĉ kiel ilo de literatura kreado. Tiu tasko estas jam plenumita, almenaŭ rilate la poezion. *Due*, la Esperantaj tradukoj devus decide influi ne nur la lingvan-stilajn, sed ankaŭ la *idean* evoluon de la Esperanta literaturo, ili devus esti ĝiaj ĉefaj inspirantoj. La Esperanta originala literaturo devus pere de ili ensorbi tiun parton de la monda literaturo, kiu harmonias kun la idealoj de la movado. Bedaŭrinde, tio ne okazis. Plimulto de la tradukitaj verkoj influis maksimume la tradukintojn. La ekzemplo de *Auld* — li elektis versojn de hungara poeto *Ernő Szép*, kiel moton al sia poemaro *Unufingraj melodioj*, kaj verskvaron de la bulgaro *Ĉilingirov* samcele por *La infana raso* — estas escepto. Estas suspektinde ankaŭ, ke la grava parto de la eldonitaj tradukaĵoj vendiĝas sur la lingvoteritorio de la originala verko.

Tiun ĉi taskon nia traduka literaturo ne povis kaj ŝajne ne povos plenumi. Signifas gravan malhelpon ankaŭ la kvanta kaj kvalita kresko de la nacilingva tradukarto, ĝuste en tiuj landoj, kie vivas plimulto de la esperantistoj: ekz. troviĝas ekstreme malmultaj Esperantaj tradukoj de *bonaj* verkoj, kiuj ne estus jam haveblaj en *bona* hungara traduko.

Fakte ni jam pritraktas la *trian* taskon, kiu havas ĝeneralkulturajn karakteron, laŭ kiu Esperanto devas servi kiel perilo inter la na-

ciaj literaturoj. Nu, tiu agadkampo vere malvastiĝis dum la lastaj jardekoj. Ni supozas, ke nur tre malmultajn klerajn esperantistojn impresis kiel novaĵo la apero de *La Floroj de l' Malbono*, tiu de la Kalocsay-aj tradukoj de Ŝekspiraj dramoj, aŭ impresos la atendebla apero de *La Luziadoj* de *Camoes* aŭ tiu de *Don Kihoto*: grandparte ili jam legis tiujn verkojn. Oni devus serioze pripensi, ĉu estas inde entute dediĉi intelektajn kaj financajn fortojn por tradukado de vaste konataj grandaj verkoj el la t. n. „ĉefaj lingvoj“?

Estas ĝuste la elspezo de movad-origina mono, kiu rekte malpliigas la eblecojn de la originala Esperanta literaturo. La eldono de tradukaĵoj iom post iom fariĝas naciskala tasko: tion bone signas ankaŭ la decido ĉesigi la tradukajn branĉojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. Oni devas lasi la eldonadon de tradukaĵoj al la naciaj neesperantistaj eldonejoj. La tradukaĵoj iom post iom devos kontentiĝi pri ne pli granda rolo kaj prestiĝo, ol ili havas en nacilingvaj sferoj, kaj neniel laŭ mi — krom vere elstaraj esceptoj — povos klasiĝi kiel integra parto de la Esperanta literaturo.

Tamen tio ne signifas, ke la estonto de la Esperanta tradukarto estus nuboplena. Bonaj tradukoj necesas nun kaj necesos ĉiam, tamen iom pli celkonscie elektitaj, ol ĝis nun; ili interpretu verkojn, kiujn ni vere ne povas legi en nacia lingvo; estas bezonata pli granda atento al la legkutimoj de la publiko: oni devas eldoni pli multe da literature altvalora, moderna, internacie komprenebla kaj atentoveka prozo.

Vilmos Benczik

Jen, la unua poemtraduko en la Internacia Lingvo, aperinta en la Unua Libro:

EL HEINE

En sonĝo principon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro, —
Sub arbo, sub verda ni sidis
Tenante sin koro ĉe koro.

De l' patro de l' via la krono
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for lia scepro kaj trono —
Vin mem mi deziras, aminda!"

— „Ne eble!” ŝi al mi rediras:
„En tombo mi estas tenata,
Mi nur en la nokto eliras
Al vi, mia sole amata!"

(Trad. L. L. Zamenhof)

Kaj alia traduko de la sama poem-
o, farita post 82 jaroj:

HEINRICH HEINE:

LIRIKA INTERMEZO

En sonĝo principon vidis mi
kun palaj vangoj ploraj,
sub verda tilio sidis ni,
tenante nin kor ĉe-koraj.

„Ne strebas mi je l' patra tron',
nek je la scepro el oro,
nek je la diamanta kron',
vin mem mi volas, trezoro.”

„Ne eble — rediras ŝi al mi —,
min kaŝas kav' tombara,
nur nokte eliras mi al vi,
ĉar vin mi tre amas, kara.”

(Trad. K. Kalocsay)

SÁNDOR PETŐFI:

PATRIOTA KANTO („HONFIDAL”)

Vi estas, ho patrujo,
Mia kor', anim'!
Kiun amus mi en mondo,
Se ne vin sen lim'?

En preĝej' de mia sino
Vi altar', patruj',
Ĝin bezonu, la preĝejon
Mi faligos tuj!

Kaj por lasta fojo preĝos
La falanta sin':
Benu Dio la patrujon,
Benu Dio ĝin!

Sed mi diras al neniu
El amika rond',
Ke vi estas plejkarajo
Mia en la mond'.

Viajn paŝojn mi senĉese
Sekvas sur la ter',
Kaj ne kiel ombr' migranton
Nur dum belveter'.

Sed, se kreskas ombro, kiam
Venas la vesper',
Pli malĝojas mi pro nokto
Super patra ter',

Iras mi al viaj anoj,
Kun pokal' en man'
Peti sorton, ke rebrilu
Vi per nova san'.

Trinkas mi el glas' ĝis lasta
La gutet' da vin',
Vin' maldolĉa — miaj larmoj
Falas ja en ĝin.

El la hungara trad.

Antoni Grabowski
(El Parnaso de popoloj, 1913)

SÁNDOR WEÖRES:

HUNDBAZARO

Marde en la strato mordo
malfemiĝis hundbazar',
per tabur' ĝin inaŭguris
Hundorela Baltazar'.
Hundbazar', hundbazar',
Hundorela Baltazar'.

Bunta hundo ok forintojn,
blanka costas nure kvar,
eĉ por du forintoj estas
jam hundet' por klientar'.
Hundbazar', hundbazar',
Hundorela Baltazar'.

Tr.: Béla Hules.

PAUL VERLAINE:

AŬTUNA KANTO

La velksezon'
Per violon'
Ĝemo-sona*
Vundas ĉe l' kor'
Min per langvor'
Monotona.

Sufoke nun
Kaj pale, dum
Tintoj horaj,
Memoras mi
Kaj ploras pri
Tagoj foraj.

Mi vagas, jen
Zigzagas en
Vento forta,
Kun svena fal',
Simile al
Branĉo morta.

El la franca: K. Kalocsay
(El la kolekto
Eterna Bukedo)

N. A. NEKRASOV (1821–1877)

* * *

Hieraŭ ĉirkaŭ je la sesa
ĉe urba stratofino
oni punbatis per la knut'
junan kampaninon.
Ne sonis voĉo el la brust' —
nur vipo fajfis fia...
Kaj diris mi al Muzo: "Jen!
Ŝi — fratino via!"

(Tr.: A. P. Logvin)

A. A. FET

MI ALVENIS KUN SALUTO

Mi alvenis kun saluto
diri, ke la suno varma
jam vekiĝis por la tuto —
ĉie tremas lumo ĉarma;
diri, ke arbar' vekiĝis,
per vivanta branĉa ero,
per birdaro ekvigliĝis
pro soif' la primavero;
diri, ke por mi alblovos
de ĉiu lok' gajo pura,
kaj silenti mi ne povas —
iĝas kanto jam matura.

Tr.: A. P. Logvin



Foto: I. Regős

MÁRTON FEJES

La nomo de Márton Fejes jam sonas konata por niaj legantoj, tamen ĝis nun iel ne troviĝis okazo prezenti lin aparte. Sed pli bone malfrue ol neniam...

Li naskiĝis en la jaro 1941, ellernis Esperanton en 1964, kaj profesie laboras kiel altlerneja teknika fakinstruisto. Li ekaktivis en la nacilingva kaj Esperanta gazetaraj dum la lasta jardeko. La sfero de lia interesiĝo estas tre vasta, kun emfazo en la ĵurnalismaj ĝenroj, tamen lastatempe li koncentras sian atenton al la tradukado de poemoj. La ĉi-subaj verkoj montros, ke liaj klopodoj promesas maturajn fruktojn.

MIKLÓS RADNÓTI:

ODO DE HEZITO

Jam ekde longe intencas mi por vi
 esence sole, kaj nur unuscene
 galaksion de mia am' disvolvi.
 Sed tumultas vi, kiel la esto ene,
 kelkfoje certa, eterna, inunda,
 kiel en roko la ŝtoniĝintaj konkoj.
 Sin movas la nokto pro luno bunta,
 ĉase post susuraj, flugaj, etaj sonĝoj.
 Mi nun ankoraŭ ne povas prezenti,
 kion signifas al mi dum labor'
 vian protektan pririgardon senti.
 Kompar' ne taŭgas, ĝin mi ĵetas for.
 Kaj la tuton mi rekomencos poste,
 ĉar tiom valoras mi, kiom la vort'
 en poem', kaj tio ekscitas ĝisoste
 ĝis restos el mi nur ostoj post la mort.'
 Vi lacas, la tag' ankaŭ por mi estas
 longa. Kion do plu? Sur la tablotuko
 la aĵoj pri vi laŭde atestas,
 sonas sukerer', kaj da mielo guto
 kiel orglob' falanta brilas surmeble.
 De si mem ektintas glaso de malpleno,
 feliĉa, ja vivas kun vi, mi eble
 priskribos ĝin ankaŭ ĉe via alveno.
 Malhel' falanta de sonĝo min tuŝas,
 flugas for, kaj revenas al via frunto,
 okuloj lacaj viaj min salutas,
 via harar' disetendiĝas en bunto.
 Palpebroj viaj vibras jam en dormo,
 mano sur kusenon falas — betula branĉo,
 sed en vi dormas ankaŭ mi, ja sama mondo,
 kaj tie mi aŭdas signojn pri ŝanĝo
 de misteraj mincaj sulkoj
 en via friska polmo.

GYÖZŐ CSORBA:

PLI BONE

Komuna lingvo...

Ĉu vortoj, gramatik'?

Ĉu lante el bruo kreskanta muzik'?
 Ĉu praa bosk', kun floraro elita
 en histori', en sorto kulturita?
 Ĉu korobat', se sub ĉiel' fremdlanda
 ĝi varme flirtas al orel' fluganta?
 Ĉu averto patra, ĉu kares' de panjo,
 ĉu misa pep' sensenca de l' infano?
 Ĉu konsil' bona, se dum tagoj-noktoj
 alfalas nin misteroj obstruktoj?
 Aŭ se pli gravigos aliulon am':
 ĉu pruvintenca konfeso pri flam'?
 Ĉu „unu-du!” komando akordiga
 sur la kamparo de l' vivo praktika? —

Tiuj ĉiuj,

sed estas pli bone
 se ag' defenda por rebati kune
 atakanton, aŭ ĉe obstaklo, baro,
 kiel de unu korpo sinkrona elano,
 aŭ burĝonanta ridet' spontanea,
 se nubon grizan sekvos ark' ĉiela,
 pli bone, se estas ritma okulum',
 reaganta ŝanĝon de ombro kaj lum':
 se multaj en unu organiziĝontaj
 ekparolos poste per vortoj senvortaj.

KALOCSAY PRI LA TRADUKARTO

Ni publikigas ĉi tie leteron de Kalocsay de antaŭ sep jaroj, adresitan al la ĉefredaktoro de Hungara Vivo pri poemtradukoj el la hungara lingvo, alsenditaj al la redakcio. Ĉar la letero povas kalkuli pri pli vasta publiko, ni presigas ĝin en tiu ĉi numero, dediĉita al la problemaro de la Esperanta tradukarto.

Kalocsay skribis ĝin en hungara lingvo, krom kelkaj vortoj kaj unu duonfrazo, kiuj estas nekursivaj en la traduko. Pro la karaktero de la enhavo estis maleble eviti en la teksto aludi kelkajn hungarajn vortojn, pro kiuj niaj eksterlandaj legantoj certe pardonos.

KARA MIHÁLY!

Mi promesis, ke mi donos mian opinion pri la tri poemtradukoj de s-ano Sz. en skribita formo. Nun mi jam pentas pro tio, ĉar „scripta manent”, sed promeso estas sono, — plenumo estas bono.

Bedaŭrinde, neniu el la tradukoj estas publikigebla, nek konservinda por estonta antologio. Mi ne kontestas, ke ili atestas pri laŭdinda klopodado, eĉ, pri ioma rimtrafa sagaco: la malbono nestas en tio, ke malfacilas rekoni en ili la originalajn poemojn. La originalaĵoj estas bonaj poemoj, sed tiuj ĉi ne estas bonaj. Tio aparte koncernas la tradukojn el Attila József kaj Kosztolányi. Cetere tiuj, almenaŭ parte, apartenas al la kategorio de la poemoj netradukeblaj. Ekzemple, la komenco de la poemo de A. József memorigas pri la unua verso de (la tridiciŭginta hungara traduko de)¹ la protestanta psalmo „En vi mi fidis ekde la komenco”; la Kosztolányi-poemo rekte aludas la primortan Predikon²: „Vi vidas, homfratoj”, Neniu traduko en iu ajn lingvo kapablas redoni tiujn aludnuancojn.

Kompreneble, tio ne ekskludus, ke la traduko estu akceptebla. Sed mankas el ĝi ne nur tiu nuanco.

En la poemo de Attila József oni sentas iun amarun atmosferon de „diablo forportu ĉion!”, de ŝultroleva aroganteco, kio estas frukto de malesperigo, kaj ĝuste ĝi donas la spicaĵon de la poemo. El la traduko ĉio ĉi tamen komplete mankas. Mi ne povas analizi la tutan poemon, sufiĉas mencii la lastan verson. La originalo tekstas laŭvorte: „Mi vivis kaj pro vivo mortis jam ankaŭ aliaj”, dum la traduko diras: „Mi vivis kaj la viv' finiĝas per morto”. La ĉi-lastata aserto estas banala ĝeneralaĵo. Sed ja la originalo diras, ke por li — kaj tio jam okazis ankaŭ al aliaj — la vivo estas mortiga malsano. Do, ne la vivo finiĝas per morto, sed li mortas pro la vivo, kiel pro grava malsano. Granda diferenco! En tiu ĉi traduko la tradukinto klopodis trovi riĉajn rimojn, kaj li sukcesis en tio (aferis-aperis, gerlenon-arlekenon, gazetojn-frazetojn), sed, unue, tiuj rimoj forkondukas lin de la originala versteksto, — pardonu, due, ĝuste en tiu ĉi poemo A. József ne uzas riĉajn rimojn, eĉ, la lasta rimparo estas tute pala: „leltár — halt már” (evidente

ankaŭ per tiu rimedo la poeto volis sentigi lacecon, rezignon).

Male, en la poemo de Kosztolányi ne?! malhaveblas ĝuste la ludado per rimoj: la stranga efiko de la poemo fontas el la kontraŭdiro inter la morna enhavo kaj la parada verstekniko. Kaj la tradukinto ĉi tie aplikis multajn t. n. adasismojn, sufiksrimojn (bonege-treege, moralajo-ajo, rigidiĝante-relikviĝante, kemiajo-kreitajo), — malgraŭ ke la esperantistaj tradukistoj hontas peki tiaĵojn jam depost jardekoj — krome ankaŭ du tute surdajn asonancojn kiujn esperantistoj tute ne aŭdas rimoj: samaj-kunfalaj, malsamaj-saĝaj. (...)

Oni ne miskomprenu min, mi ne ironias. Temas pri du poemoj tre malfacile solveblaj; se la tradukinto malgraŭ siaj malmultaj praktikaj spertoj povus produkti solvon nur akcepteblan aŭ almenaŭ korekteblan, oni devus saluti lin kiel admirindan geniulon de la Esperanta tradukarto. Estas mi, kiu pleje bedaŭras, ke tiu saluto maleblas.

Mi ne volus, ke prov-tentantoj de la tradukarto — aĝe aŭ esperantiste pli junaj ol mi — rigardu min kiel verspapon aŭ eĉ verslupon (mi aŭdis pri malpacemuloj, kiuj volonte konspirus por mia detronigo, sed ili apenaŭ sukcesos en tio, ĉar tronon entute mi ne havas, nur ĉ. 45-jaran tradukistan praktikon kaj ĉ. 50 000 tradukitajn versojn).

Se mi povas konsili ion al la komencantaj tradukistoj, tiu konsilo povas esti nur, ke ili ne kontentiĝu pri la solvoj tuj prezentiĝantaj, ili ne kontentiĝu pri la unua rimtrovo, sed ĉiam denove kaj denove ekzameni sian tradukaĵon, ĉu ĝi estas sufiĉe fidela al la originalo en sia atmosfero, senco, sonado, tono ktp. Eble la unuajn tradukojn ili tralaboros dek- aŭ dudekfoje. Poste ju pli multe da poemoj ili jam tradukis, des pli facile ĉio iros.

Kompreneble, ankaŭ necesas, ke oni konu la elementojn de la Esperanta versfarado. S-ano Sz. ekzemple kunrimigas la vortojn spion' — kion. Sed tiuj rimoj ne kunrimas, same, kiel ne kunrimas ekz. amas kaj amas'. Oni devas scii iomete ankaŭ pri la ritmo, sed tion mi ne povas detale trakti ĉi tie.

La tria poemo estas la plej facila; la diferenco inter la originalo kaj la traduko eble ĉi tie estas la malplej granda, sed, bedaŭrinde, ankaŭ ĝi bezonas ne malmultan korektadon. Mi faris tion, ta-

La maljunulino kaj la morto

Ĉu estis, ĉu ne estis, trans la Fabeloceano vivis maljunulino, pli maljuna ol la arbarmeza kverko, tamen ŝi ne volis morti.

Gefilojn ŝi ne havis, neniun ŝi havis, malgraŭ tio ŝi ĉiam iris-venis, laboris, kolektis la sonorajn tale-rojn. Ŝia tulip-desegnita kesto jam plenis da oro kaj arĝento. Doloris ege ŝia koro pensante pri tio, ke iam venos la Morto, kaj ne demandos: ĉu vi venos aŭ ne, sed prenos kaj forportos ŝin.

Kaj vere, bone ŝi pensis, ĉar subite alvenis la Morto kaj diris al ŝi:

— Preparu vin, maljunulino, ĉar mi forportos vin.

Petis, petegis la maljunulino:

— Ankoraŭ dek jarojn!

— Ne, ne eblas, mi forportos vin.

— Ankoraŭ nur kvin.

— Ne, ne eblas, preparu vin; mi jam skribis vian nomon en mia granda libro, mi ne povas forstreki la noton.

Sed la maljunulino tiel ploradis, tiel petegis, ke la Morto donacis al ŝi tri horojn.

— Donu pli da tempo — petis la maljunulino —, lasu min ankoraŭ vivi iom. Venu morgaŭ!

— Je Dio — diris la Morto —, do estu laŭ via volo! — kaj ekiris, sed ankoraŭ aldonis:

— Sed morgaŭ mi venos!

— Bone, venu nur — diris la maljunulino —, sed sciu, estos pli bone, se vi skribos sur la pordofosto la vorton „morgaŭ”, por ke mi ne forgesu pri ĝi.

La Morto prenis el ŝia poŝo kreton, skribis sur la pordofosto la vorton „morgaŭ” — kaj foriris.

La sekvan tagon frumatene venas la Morto, kaj la maljunulino ankoraŭ kuŝas en la lito.

— Ek, maljunulino, jam forpasis via tempo.

— Tute ne — diras la maljunulino — rigardu la pordofoston, kio estas skribita sur ĝi! Hodiaŭ vi ne rajtas forpreni min, nur morgaŭ.

Tio daŭris unu semajnon, du semajnojn, la Morto ĉiutage venis por la maljunulino, sed la maljunulino ĉiuokaze montris la pordofoston, kaj la Morto devis foriri ege kolere. Sed fine ĝi ekkoleris, forviŝis la skribon kaj minacis la maljunulinon:

— Nu, morgaŭ mi certe forportos vin!

Hej, Dio mia, ektimis la maljunulino, ŝi tremis kiel folio de poplo, ŝi volis kaŝiĝi, kie la Morto ne trovos ŝin.

— Hop, jen — ŝi ekpensis. Ŝi havis kuvon plenan da mielo, ŝi sin kaŝis en ĝi.

— Nu, certe ĝi ne trovos min.

Sed ŝi ne trovis trankvilon, ĉar ŝi timis, ke tamen trovos ŝin la Morto. Ŝi eliĝis el la kuvo, fendis la kusenegon kaj kaŝiĝis inter la plumflokaj de la lita kusenego.

Tie ŝi restadis iom da tempo, sed trankvilon eĉ tie ne trovis, — elrampis el la kusenego por serĉi pli bonan kaŝejon.

La Morto enpaŝis ĝuste kiam ŝi estis elrampanta. Ĝi konsterniĝis, kio povas esti tiu blanka, plumhava monstro! Ĝi terure timiĝis kaj forgalopis, eĉ per mielkuko oni ne povus reloĝi ĝin.

Kaj la maljunulino vivas eĉ nun.

Morgaŭ ŝi gastu ĉe vi!

El la hungara: Maria Benczik

men nur improvize; mi ne asertas, ke oni ne povus plu poluri ĝin. Cetere tiu ĉi poemo ŝajnas taŭga por la venontjara unua numero, konsiderante la 25-an datrevenon de la liberiĝo (de Hungario).¹ — Ĉar mi transprenis kelkajn rimojn el la traduko (de Sz.)¹ mi ne volas subskribi ĝin kiel tradukinto.

Mi ĝojus, se s-ano Sz. ne vidus en tiu ĉi mia opinio superecan tradraŝadon, sed bonintencan helpon en sia tradukista kariero, por kiu subskribinto deziras al li multajn sukcesojn.

Kun amikaj salutoj:

Kálmán Kalocsay

Budapeŝto, aŭgusto de 1969.

¹ Rim. de la Red.

² La unua kompleta lingva dokumento de la hungara lingvo el la jaroj 1192–1197. Ĝi servis kiel bazo por la ŝerca projekto de Kalocsay, aperinta en la volumo *Lingvo-Stilo-Formo* sub la titolo „Mezepoka Esperanto”. La parto, aludita en tiu ĉi letero, en tiu „traduko” tekstas jene: „Widats wui, confratruy”.

KÁROLY TAMKÓ SIRATÓ:

ENKONDUKO EN LA MILITSCIENCON

La ĉefcelo de l' Militscienco:

”p e r f e k t a

nuligo

de l' malamiko”.

— Sed ni ja scias

ke l' homo mem

m a l p e r f e k t a s . . .

Tiel li eĉ tiun celon ne atingos,

devas kontentiĝi

per duona

kvarona

eĉ per plia

„malperfektaj”

— f r a k c i — r e z u l t o j !

Tr.: M. Fejes

LITERATURA METIEJO

Konstantan rubrikon ni inaŭguras per ĉi kolumno, la paĝon: *Metiejo*. La lastatempe elformiĝinta kaj klare videbla karaktero de nia revuo certe ne lasas dubon pri tio, ke temas pri literatura metiejo. Ĝian bezonon ni jam delonge sentis: kaj la ĝojige, konstante altiĝanta nombro de la ricevitaj manuskriptoj: prozaj kaj poeziaj originalaĵoj kaj tradukaĵoj jam igis ties fondon ne plu prokrastebla.

Parton de la ensenditaj kontribuajoj ni sukcesis publikigi, se ties temo kongruis kun niaj ideoj, planoj, intencoj; kaj se ties nivelo antigiis aŭ alproksimigis niajn normojn, sed ĉe alia, — pli granda — parto de la manuskriptoj estus dezirinde konsulti kun la ensendintoj, proponi al ili ŝanĝojn por plibonigo, redoni la verkon kun konsiloj por maturigo, por plua poluro.

Pere de korespondado tiun taskon ni ne sukcesis plene solvi, tial ni esperas, ke la nova rubriko povos plenumi ĝin. Des pli, ĉar en la alsenditaj kontribuajoj ofte ripetigas la samaj mankoj kaj miskomprenoj, — do la publika respondo ŝajnas pli efika, pli utila por pluraj verkemuloj, literaturamantoj.

Estu tiu rubriko ligilo inter niaj konstantaj kaj okazaj kunlaborantoj. Ni planas ĉi tie publikigi ankaŭ verkojn (tradukojn) ne plenmaturajn por publikigo — se tiuj almenaŭ burĝone atestas pri talento, se la manuskripto konvenas al bazaj kondiĉoj kaj nur en detaloj ĝi restas plibonigenda.

Tiuj kontribuajoj publikigataj kun la aldonataj analizo kaj kritiko eble helpas la aŭtorojn (tradukantojn) al pliperfektigo, samtempe por nia legantaro prezentos iom la instruoj kaj frandaĵo.

Pro la limigita spaco ni povos

okupiĝi nek pri ampleksaj prozaĵoj, nek pri longaj poemoj.

Por prijuĝi la ensenditajn verkojn, la zorgantoj de ĉi tiu rubriko konsultos literatorojn kompetentajn, same la bazajn verkojn: Lingvo Stilo Formo kaj Parnasa Gvidlibro, kies tezojn ni akceptas kiel bazajn kondiĉojn kaj normojn. Ankaŭ nian devizon ni ĉerpas el ĉi laste menciita verko, citante el Kalocsay: „Ni ĉion donas krom genio.” Kaj tamen kion? Resume kaj emfaze: helpo kaj kuraĝigo por talenthavaj verkemuloj, instigo, ankaŭ publikeblon, — kaj por ĉiu leganto — bonan amuziĝon.

Ĉar Hungara Vivo — konforme al sia nomo — celas unuavice informi pri hungara vivo, kulturo, literaturo, ktp. — por tradukantoj ankaŭ konkurson ni malfermos.

ATTILA JÓZSEF:

POR MIA NASKIĜTAGO

*Forflugis jaroj tridekdu,
solene poem' efektu
al mi,
ĉarmi*

*min mem en kafeja spaco,
por surprizo kaj donaco,
estu,
festu*

*Tridekdua jam ĉi tago,
ĝis nun sen sufiĉa pago,
sciu
ĉiu!*

*Pedagog' mi estus eble,
ne ronĝanta plumon feble
ulo-
nulo*

*Sed de l'studoj min sinjoro
profesoro kun rigoro
krude,
trude*

Anstataŭ premioj ni povas doni nur publikeblon: la plej sukcesajn tradukaĵojn ni prezentos (parte aŭ tute) paralele por komparo kaj instruoj.

Ni okupiĝos alterne pri tradukaĵoj kaj originalaĵoj. En la sekva numero la rubrikon ni dediĉos al originalaj poeziaĵoj. Manuskriptoj estas bonvenigataj (bonvolu surskribi sur la konverton: „Metiejo”).

La metiejan laboron ni komencas per la sekvantaj tradukaĵoj, por kompari kaj analizi. Ambaŭ tradukaĵoj venis samtempe, ambaŭ tradukistoj, estas talentaj, junaj, poetoj havantaj en sekvaj poemoj bonajn solvojn, samtempe kelkajn mankojn...

Parte ni ĝuis, parte prijuĝis ilin... Kaj nun juĝu la legantoj mem.

I.

*forigis per voĉo pela
pro mia poem' ribela.
Arde,
garde*

*li levis la sabron akran
por ŝirmo, la landon patran
armi
al mi*

*„Dum vivas mi memkonscie,
ne instruos vi ĉi tie” —
diris,
brilis*

*Se akceptas li aklame,
ke mi ne studas plu, vane
ĉi goj'!
Mi — oj! —*

*instruos al popol-tuto
ne en mezlerneja ŝtupo
tamen!
Amen!*

Tr.: Márton Fejes

POR NASKIĜTAGO MIA

Tridekdujara datreven',
memori estu jen poem',
takto-
fakto.

Oferas en kafej' de ŝat'
por solenat' la solenat'
en sol'
de sol'.

La sorto estis: vana fajr'
en ega ag' por etsalajr',
sciu
ĉiu!

Eblintus iĝi instruist',
ne sklavo de l'skribista trist',
sen rav'
de l' hav'.

Sed el la studo en provinc'
eksigis min spirita minc',
la stult',
la kult'.

Atingis bruske min la ĵet'
pro „dio-nega” versaĵet',
la font'
de l' hont'

eksplodis forbalai min
pro nome kontr'eduka krim'
el hor'
de l' mor'

Dum parolpovos mia lang',
vi ne instruos en ĉi land'
la strik-
ta dikt'.

Sinjur' rektoro, vin la ĝoj'
pro fermo de l'filistra voj'
rompis,
trompis.

Ĉar mia tasko por naci':
al Elize' de l'homa sci'
sen di'
sendi!

Tr.: Attila Hlavathy

PENSOJ PRI LA TRADUKOJ DE LA POEMO

Születésnapomra
de Attila József

La poemo de klasikulo de la hungara socialisma poezio, Attila József (1905—1937) kreiĝis en la lasta jaro de lia vivo. Li verkis ĝin en aprilo, kaj en decembro li finis sian vivon per sinmortigo.

La grave malsana poeto, multe suferanta pro siaj nervoj, distras sin per tiu versaĵo, kiun li formas ludo, kvankam esence ĝi estas unu el la lastaj help-krioj de homo forlasita de la socio. Laboron li ne havas, ne sukcesis iĝi eĉ mezlerneja instruisto... Kiel tio okazis, li konfesas en la poemo.

La strofojn fermas rim-vortludoj el du vortoj du-silabaj. A. József elektas vortojn, kiuj forme sonas preskaŭ, aŭ tute samaj, sed ilia signifo diferencas. Ofte la vortoj, malgraŭ forma simileco, apartenas al diversaj vortospecoj (trad. laŭsenca, ne rimanta):

Az ám,	Nu ja,	a hont	la patrion
Hazám!	Patruj'!	kivont	elingita
fura	stranga		(sabro)
ura	mastro	sekély	eta
		e kěj	plezur'

En aliaj kazoj la vortludo okazas per identformaj vortoj:

magam	min mem	aŭ mi mem
magam	mi mem	aŭ min mem

Ĉi-loke la poeto fruktuzas tion, ke en la hungara oni ne devas uzi akuzativan finaĵon ĉe tiu refleksi-vo en unua persono (-t: magamat=magam) (si mem, sin mem).

Gagyog pepas (infano); sencece parolas (plena-ĝulo)

ragyog brilas, lumas

Ĉi-loke al la preskaŭ sama sonado rimas tute alia signifo.

Szegény malriĉa (povra)

legény fraŭlo

sed la du vortoj kunigite: „szegénylegény” signifas „mizerulo”, (fraŭlo rifuĝinta eble de soldatiĝo kaj vivanta foje-foje el rabado).

Kaj aparte ni parolu pri la unua strofo:

Harminckét éves lettem én —

	Tridekdu jara iĝis mi —
meglepetés e költemény	supriz' de ĉi poem'
csecse	(ĝia) belo
becse	(ĝia) valoro

Delikata vortludo: „Csecse” signifas en beb-var-tistina lingvaĵo: bela, ĉarma, — „becse” havas la signifon: ĝia valoro. La du vortoj kune prononcitaj, aŭ skribitaj: „csecsebecse” havas la signifon: ornamaĵo; tiel la strofo povas havi plurajn sencojn.

La lasta vortludo:

taní-

tani

En si mem tiuj du samaj vorteroj ne havas sencon, sed kune: „tanítani” signifas „instrui”.

El tiu mallonga, forma analizo vidiĝas, ke tiu ĉi poemo prezentas malfacilan taskon eĉ por la plej sperta tradukisto. Pri tio atestas, ke K. Kalocsay ne publikigis (eble eĉ ne tradukis) tiun poemon en Esperanto, nur la lastan strofon li citas en artikolo pri A. József (HV 1961/3—4)

„Al tutpopol' mi scios plejan
instruon, ne nur mezlernejan
radi-
adi”

Ni prezentas du diversajn tradukojn de la tuta poemo, sed tiuj solvis nur parton de la taskoj. Troviĝas kelkaj bonaj lud-rimoj: al mi — ĉarmi, armi — al mi, estu — festu, sciu — ĉiu, ulo — nulo, krude — trude, arde — garde, diris — bñilis, tamen — amen, (I); fakto — takto, rompis — trompis, la stult' — la kult', sen di' — sendi (II.).

Sed tute ne uzeblaj: ĉi ĝoj' — Mi! Oj! (I); en sol' — de sol', sen rav' — de l'hav', la font' — de l'hont el ĥor' — de l' mor', (II).

Laŭ mi povas esti nur ŝerco rimi tiel: la strik-
ta dikt' (II.)

En la hungara originalo la du longaj versoj havas viran rimon. En la Esperanta poezio tio estas laŭeble evitenda, unuavice tial, ĉar en tiu kazo oni devas rimigi preskaŭ ĉiam substantivojn (II.), sed tute ne estas permesite rimigi virajn kaj inajn rimojn, kiel faras la alia tradukinto.

Laŭ mi ĉe la pritraktata poemo en Esperanto oni devas uzi inajn rimojn en la longaj versoj; male en la mallongaj eble oni rajtas variu la du versfinaĵ-tipojn pro la kunsonoro, tamen la vortoj povas diversi nur ĉe la komenco de la unua silabo. La tradukanto devas trovi vortojn, eĉ apartenantajn al malsamaj vortospecoj.

Anstataŭ plua analizo estu ĉi tie la „metieja” traduko de la poemo, kiun mi faris, uzinte la bonajn rimojn, kiel faras la alia tradukinto.

Péter Rados

III.

JE MIA NASKIĜTAGO

Al tridekdua datreveno
surprizo estu ĉi poemo-
dekor'
de kor';

donaca aĵo kaj gratula
ĉe la tablet' kafej-angula
al mi
ĉarmi.

Tridekdu jaroj jam forfajris,
sed ducent pengojn ne salajris.
Sciu
ĉiu.

Mi povus esti pedagogo,
ne plum-trivanta en ĉi loko
ulo-
nulo,

sed min forpelis la altranga
moŝto universitata, stranga
trude-
krude.

Li min riproĉis pro la forto
de la ribela poem-vorto.
Arde-
garde.

li levis sian sabron akran
por defendi la landon patran.
Li jen
tien

ĉi venas: „Dum mi viva restos
ja instruisto vi ne estos”-
diris,
brilis.

Sinjoro Horger, via ĝojo
pelante min de mia vojo-
rompis,
trompis:

en tutpopola instruado
mi agos ne en meza grado
tamen.
Amen.

P. Rados

DÁNIEL BERZSENYI

(pron. daniel berĵenji), unu el la plej signifaj poetoj de sia epoko, naskiĝis antaŭ 200 jaroj, en 1776 kaj mortis en 1836. Li estis majstro de la klasik-poeziaj formoj: tamen liaj zorge ĉizitaj poemoj tute ne impresas kiel kabinetaj produktoj, sed sinceraj ek-veoj de animo baraktanta. Okaze de la jubileo ni represas lian eble plej popularan poemon en la traduko de K. Kalocsay.

Parton de tiu poemo Kalocsay retradukis kiel ilustraĵon por sia eseo *La klasika metriko kaj Esperanto*. Jen por komparo la unua strofo de tiu dua varianto:

Velkas jam nia bosko, frondodekoroj falas,
krakas flava folio tra l' nudigitaj branĉoj,
for la rozlabirinto, inter odor' balzama
spir' zefira ne flirtas plu.

Kaj jen, la tuta poemo:

Velkas jam nia bosk', falas ornam' de ĝi.
Inter nuda branĉar' krakas foli-velkaĵ'.
For la rozlabirint', inter balzamodor'
Ne plu flirtas zefira spir'.

Mutas birdsimfoni'; inter la laŭba verd'
Plu ne ploras la turd'. Sub la salik-ombrel'
Ne odoras viol' en rivereta val',
L' akvon kovras sovaĝa fuk'.

Sur deklivo de l' mont' kuŝas malhel' kaj mut'.
Sur nektara branĉet', ne plu ridetas ber'.
Gaje ĵus tie ĉi sonis jubila kant',
Ĉio mutas kaj mortas nun.

Ho, subite de ni flugas la flirta temp'.
Kaj donacoj de l' temp' ŝvebas sur tempflugil'.
Ĉio — nur aperaĵ': ĉio ja sub ĉiel'
Mortas kiel la miozot'.

Velkos baldaŭ la flor' en mia kapfeston',
Pasos mia printemp'; kaj ja apenaŭ min
Ravis ĝia nektar' kaj ja apenaŭ eĉ
Tuŝis florojn mi per la man'.

Min la bela junaĝ' lasos for sen reven'.
Al mi nova printemp' ne plu reportos ĝin.
Nek resorĉos plu min post la okulfermiĝ'
Lolla per sia bruna brov'.

(El Hungara Antologio)

REVUO DE REVUOJ

Publikiĝis la *Programo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio* por la jaroj 1976—1980 en cirkulero de ĈEA. Laŭ tio ĉefa misio de la Asocio estas *unuece organizi ĉiujn esperantistojn en Ĉeĥa Socialisma Respubliko sur la organiza bazo de la lokaj grupoj*, — aliflanke per celkonscia kaj sincera informa agado *konatigi al eksterlandaj esperantistoj la konstruan laboron en la respubliko*. Por tiu celo ĈEA disvolvos kunlaboron kun eksterlandaj E-organizaĵoj. „Ni klopodos — deklaras la PROGRAMO — per ideo-politika kaj organiza agado en edukado de niaj membroj al konscia kaj aktiva ŝtataneco, ĉe respektado de la principoj de demokratia centrismo kaj internacia solidareco, en la spirito de la XV-a kongreso de Komunisma Partio de Ĉeĥoslovakio.”

ESPERANTISTO SLOVAKA 1975/6 citas la valorajn respondajn vortojn de M. I. Isajev, d-ro de filologiaj sciencoj, gvidanto de Problemgrupo por Internacia Helpa Lingvo en Lingvosciencia Instituto de Scienca Akademio de USSR. La respondotan demandon metis J. Vasiljev el Zima (Irkutska regiono): „Ĉu konekse kun plivastigo de la internaciaj rilatoj ne estus necese renovigi la uzadon de la latino?” La interparolo aperis en NOVA EPOKO, eksterlandpolitika semajna revuo en Moskvo, samtempe en ĝiaj angla, araba, ĉeĥa, franca, germana, hispana kaj pola eldonoj. D-ro Isajev en sia respondo eksplikas, ke la internaciajn rilatojn malfaciligas la fakto, ke en la mondo ekzistas 4—5 naciaj „mondlingvoj”. Krome ekzistas pr. 500 projektoj de internacia helpa lingvo, inter kiuj plej konata kaj sola uzata estas E. — „Ankaŭ nuntempe estas prezentataj novaj projektoj, ankaŭ tiu fakto montaras ke paralele kun la vastiĝo de la internacia kunlaboro la internacia helplingvo estos pli kaj necesa. Ja krom la angla, franca, rusa, hispana, germana kaj ĉina en la monda forumo aperas ankaŭ la japana, araba, hinda kaj — svahila . . . , — memorigas la leganton Isajev. Poste li daŭrigas jene: „En Esperanton estis tradukita granda parto de la rusa kaj soveta literaturoj. („granda parto” estas troigo! Rim. de red.) Ĉi lingvo havas kaj kontraŭlojn kaj sindonajn admirantojn. El inter ĝiaj favorantoj estas menciindaj L. N. Tolstoj, M. Gorkij, H. Barbusse, K. Ciolkovski, I. Miĉurin, akademianoj I. Orbeli, A. Berg kaj la poeto M. Isakovski . . . Rilate la instigon renovigi la uzadon de la latina — ĉi afero estis jam ofte priparolita. Tamen latino estas malelasta kaj malmoderna. La provoj enkonduki ĝin denove ne sukcesis, kaj la uzado de la lingvo sinsekve limiĝas. Sed lastatempe rimarkeble kreskas la praktika uzado de E . . . Pli ol 50 jarojn ekzistas internacia Akademio de E, inter kies anoj troviĝas ankaŭ sovetaj sciencistoj. Ankaŭ en

USSR oni dediĉas sin al la esplorkomunlaboroj pri helpa lingvo por internacia interkompreniĝo, kaj estas esplorataj la eblecoj de ĝia uzado. Laŭ decido de la prezidantaro de Akademio de Sciencoj de USSR, pri ĉi tiuj problemoj okupiĝas nia instituto” — finas sian kompetentan respondon Isajev.

En revuo *Der Esperantist* la redaktoro D. Blanke prezentas la revuojn:

POLA ESPERANTISTO, BULGARA ESPERANTISTO kaj HUNGARA VIVO el la plumoj de D. Dungert, L. Knöschke. Pri nia HV la referanto skribas, ke „kelkaj legantoj plendas pri tro da neologismoj kaj troa malfacileco. Certe HV ne estas legajo por komencanto, sed ĝi celas esti literature valora, lingve altkvalita kaj modela por ĉiu progresema, lernema esperantisto.” Prave!

PILO-PRESS (Internacia Informservo, aperas ĉiusemajne, eldonanto: L. Pickel, D — 8500 Nürnberg. 1. Pf. 2113) n-ro 26/1976 skribas — laŭ Radio Roma — pri lingvaj malfacilaĵoj en la Eŭropa Parlamento: la Komisararo de Eŭropa Ekonomia Komunumaĵo. Borschette, respondante al demando de Brita konservativa deputito Reay lastatempe certigis, ke la membroj kaj funkciuloj de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo daŭre pritraktos la oficialajn aferojn en sia propra lingvo, kaj oni daŭrigos traduki la decidojn al ĉiu lingvo de la membroŝtatoj de EEK. Tom Normanton, alia brita konservativa deputito atentigis pri la kostoj de tia proceduro, kaj sugestis, ke la internacia lingvo E eventuale estus pli bona kaj malpli multekosta solvo.

STARTO, organo de Ĉeĥa E-Asocio 2/1976, mencias la hungaran publikan leteron al la parlamentanoj (publikigita en *Eszperantó Magazin* 10/1976 kaj represita en HV 1/1976). Kiel konate, en tiu letero la hungaraj esperantistoj instigis la hungarajn parlamentanojn fari la necesajn paŝojn — en interkonsento kun la socialismaj kaj aliaj progresmaj landoj — meti la E-problemon sur la tagordon de UN. — En Starto 3/1976 aperis letero de d-ro Jozef Hradil, gvidanto de Medicinista Sekcio de ĈEA kun titolo: „*Helpu aktivigi nian medicinistan sekcion!*” — Praktika uzo — skribas Hradil — de la internacia lingvo en kuracistaj kunvenoj kaj kongresoj, kaj ĝia aplikado en gazetaro estas la plej konvinka fakto por ties ĝenerala disvastigo ankaŭ ekster medicinistaj rondoj.”

BULTENO de Internacia Scienca Asocio Esperantista, (eldonas d-ro B. Popoviĉ, Beograd) 42/1975 publikigas, ke en Japanio ekzistas nacia sciencista E-organizaĵo, kiu havas pli ol 100 membrojn, kaj en Bulgario en la kadro de la nacia organizaĵo ekzistas E-grupo de ĉ. 100 membroj.

Iniciato de hungaraj parlamentanoj*

En aŭgusto delegacio transdonis la suban leteron, subskribitan far 140 parlamentaj delegitoj, al Gyula Ortutay, akademiano, prezidanto de kultura komitato de hungara parlamento. La valoron de ĉi tiu iniciato montras, ke 87 subskribintoj estas anoj de diversaj parlamentaj komitatoj. Estas ankaŭ grave, ke la du trionoj de la du plej signifaj komitatoj — la kultura kaj la eksterafera — donis siajn subskribojn al la letero.

Estimata Kamarado Ortutay!

Ni, subskribintaj parlamentaj deputitoj, surbaze de rajtoj garantiitaj por ni en la 23. § (5) alineo de la Parlamenta reglamento, prezentas al la kultura komitato direktata de vi gravan peton kaj proponon.

La antaŭaĵoj konsistas el tio, ke ĉiuj anoj de nia Parlamento ricevis la alvokon instigan por pensado kaj pozici-alprenado, titolita: „Letero al la parlamentanoj”, aperinta en la numero 10/1975. de la revuo *Eszperanto Magazin*. En kelkaj aldonitaj antaŭaj numeroj de la revuo ni tralegis la artikolojn „Enrigardo en la taglibrojn de l'Parlamento inter 1911 kaj 1948 — Kiuj ankaŭ en la hungara Parlamento ekbatalis por la internacia lingvo” (5/1975.) kaj „Eksterlandaj leĝdonantoj por la internacia lingvo” (6/1975.).

Surbaze de tio ni opinias, ke la alvoko de la revuo (ĝia nova titolo estas Mondo kaj Lingvo) meritas la atenton de nia Parlamento. Precipe pro tio, ĉar temas pri grandskala internacia, kultura kaj humanisma afero; temas pri tia socia celo, kiu — konvene al la Helsinki-a konvencio de Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro — intencas servi la komunajn interesojn de la tuta homaro kaj la pacan kunvivadon de popoloj. La portanto de la afero estas mondmovado disvastiĝanta en kvin kontinentoj. Kaj la science fundamentita kaj klara klopodo de tiu movado estas, ke ĝi proponas Esperanton, vivan ĝermon de vivantaj lingvoj, por la popoloj parolantaj ĉirkaŭ 3000 naciajn kaj etnajn lingvojn, samtempe direktite de la Lenin-a principo: „nenian privilegion al iu nacio, al iu lingvo...”

Rezulte de la lingvaj problemoj, de la internaciaj rilatoj, konataj kaj ĉiam pligraviĝantaj, nuntempe jam eĉ unu kulturita kaj pensokapabla homo ne povas konsideri la aferon de internacia lingvo kiel „internan aferon” de la Esperanta mondmovado, iu afero por la ŝtataj kaj internaciaj forumoj estas seninteresa, „subranga”.

Male! La solvo de multlingveco estas universala homa afero. Pro tio, devus esti prenita inter la taskojn de kompetentaj forumoj de ĉiu ŝtato, ke tiuj forumoj elformu sian pozicion indan je la komuna spirita intereso de la popoloj, ĝin maturigu kaj uniformigu en la diversaj interŝtataj forumoj,

kaj poste ĝin prezentu al la plej alta mondorganizo, al UNO. Tiu procezo jam komenciĝis, kvankam evidente, ĝia fortikigo bezonas ankoraŭ multan bataladon, multajn iniciatojn. Sed estas fakto, ke tiu problemo — kiel tio evidentiĝas el la menciita kaj ankoraŭ el aliaj artikoloj de la revuo — en la Parlamentoj de pluraj kapitalismaj kaj socialismaj landoj paraleliĝis kun diversaj agadoj, — kaj en kelkaj lingvosciencaj institutoj ĝi estas jam esplortemo.

Speciale esperiga estas el nia vidpunkto la tiaspeca laboro komenciĝinta en la Lingvosciencia Instituto de la Soveta Scienca Akademio, pri kiu informis nin en *Eszperanto Magazin* (5/1975.) András Sugár, ĉefkunlaboranto de Hungara Televido, en sia intervjuo: „Komence de nova, rapida prospero — konversacio en Moskvo kun la prezidanto de sovetaj esperantistoj.” Tiu prezidanto nome estas la soveta lingvosciencisto M. Isajev, gvidanto de la menciita akademia esplorado.

Ankaŭ ni ne povas foresti en tiu procezo. Sekve, nia konkreta propono estas, ke la kultura komitato, surbaze de la 15. § (4) kaj 49. § (2), (3) alineoj de la Parlamenta reglamento, fondu „ad hoc”-subkomision konsistantan el kelkaj deputitoj kaj el fakuloj, kiuj plej bone konas la problemojn de multlingveco kaj de internacia lingvo. Inter la lastaj troviĝu kelkaj lingvistoj kaj aliaj scienculoj, krome verkistoj, ĵurnalistoj, konantaj la temon. Apud la deputito, kiu estros la subkomision, por direkti la fakulojn estu invitata d-ro János Balázs, doktoro pri lingvosciencoj, profesoro de prilingvistika katedro de ELTE.

Laŭ nia opinio, la subkomisiono devus esplori la sekvajn demandojn:

1. La disbranĉiĝantan kaj ĉiam disvastiĝantan internaciecon kaj informaj-alfluon de nia epoko akompanas la konataj kaj pliiĝantaj lingvaj malfacilaĵoj. Pro tio estas pensinde, ĉu ni povas sinkronigi la multflankan evoluigon de la interpopolaj rilatoj kaj la amasan instruadon nenie sufiĉrezultan de la tiel nomataj mondlingvoj? Aŭ ni sciigu, ke nur tre malmultaj personoj kapablas bone alproprigi unu-du fremdajn lingvojn?

2. Ĉu estus utile, se la ŝtatoj de la mondo akceptus unu solan lingvon kiel interkonsentitan perantan lingvon, porcele de la internacia komunikado?

3. Ĉu estus ĝuste kaj oportune aŭ ne, se iu nacia lingvo fariĝus — far UNO — konsentita internacia lingvo?

4. Ĉu Esperanto povus esti taŭga por la rolo de tiaspeca — far UNO — konsentita internacia lingvo? Nome por tio, ke ĝi estu la unua deviga lingvo en ĉiuj lernejoj de la mondo?

La kultura komitato de la Parlamento invitu la fondotan subkomitaton, ke ĝi donu respondon al

la supraj demandoj pere de principa, sur faktojn bazita analizo. Ilia informo menciis la opiniojn de reputacihavaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj, institutoj, respektive tiujn de internacie konataj hungaraj kaj eksterlandaj personoj, kiuj jam elektis sian pozicion rilate la temon. Fine, la subkomitato ellaboru certajn proponojn por la kultura komitato.

La kultura komitato, kune kun la anoj de l'subkomisiono, pridiskutu la tiel preparitan informon. Tiuokaze, se la kultura komitato akceptas ĝin — per modifoj aŭ sen tiuj —, la komitato prezentu la informon al aliaj Parlamentaj komitatoj, kaj al la estraro de hungara sekcio de Interparlamentara Unio respektive, por ricevi iliajn opinion kaj apogon. La kunsidon de tiuj korporacioj partoprenu kelkaj anoj de la kultura komitato kaj de la provizora subkomisiono.

Se en tiuj forumoj la informo ĝuus majoritatan apogon, tiam la kultura komitato prezentu ĝin al la registaro, por pripensi la pluajn paŝojn kaj ankaŭ pro tio, ke la pozitiva solvo de la skizitaj demandoj povas esti preparita kaj atingita nur en internacia nivelo. Kaj niaj Parlamento kaj Registaro povus pliproksimigi la solvon, pere de la tiuvoja ekkono de l'temo kaj pere de l'elformo de siaj pozicioj.

En la provizoran subkomisionon ni proponas inviti, krom la anoj de la kultura komitato, ankaŭ kelkajn el tiuj deputitoj, kiuj subskribis ĉi tiun proponon. Krom la profesoro d-ro János Balázs estus oportune inviti kiel eksteran fakulon d-ron László Deme, profesoro-katedroestro pri lingvistiko en la universitato „József Attila” de Szeged, d-ron György Szépe, lingvisto, d-ron István Szerdahelyi, lingvisto, profesorestro de Esperanto-fako de ELTE, lektoron István Tótfalusi, lingvisto, d-ron Ferenc Jáki, mezlerneja profesoro pri lingvoj, gvidanto de la Ŝtata E-lingvoekzamena Komisiono, d-inon Márta Cser, ĉefraportanto de Ministerio pri Instruado, astronomon Aurél Ponorí Thewrewk, direktoro de Astronomia Instituto *Uránia*, d-ron Ottó Haszpra, doktoro pri teknikaj sciencoj, d-ron Béla Mészáros, docento pri biologio en la universitato „Kossuth Lajos” de Debrecen, krome la verkistojn Gyula Fekete kaj Mihály Gergely, la poeton Sándor Rákos kaj András Sugár, ĉefkunlaboranto de Televido, ano de redaktora komitato de l'revuo *Mondo kaj Lingvo*.

Ni petas kamaradon Ortutay, ke li bonvolu prezenti nian proponon apoge, en la sekva kunsido de kultura komitato. Ankaŭ tiuj deputitoj povas apogi la fondadon de subkomisiono, kiuj akceptas ankoraŭ rezerve tiuspecan alproksimiĝon al la lingvaj problemoj, ĉar pere de siaj argumentoj ankaŭ ili povas kontribui al la objektiva analizado de la nuna situacio. Kaj la prepariĝanta informo eble povus modifi ankaŭ iliajn ĝistiamajn vidmanierojn. Budapeŝt, aprilo — julio 1976.

Tr.: —vhs—

*Apeeris en la 76/5-a numero de *Világ és Nyelv* (*Mondo kaj Lingvo*).

Nova eldonajo omage al Kalocsay

Kiel en Hungara Vivo estis promesate (n-ro 4/1976. „Planoj, esperoj”), Hungara Esperanto-Asocio eldonis ĉarman libreton: kolekton el tiu poemlibro de Kalocsay, kiu — laŭ takso de la kolektinto, Vilmos Benczik — alportis revolucionan ŝanĝon en la Esperanta poezio en la jaro 1931.

La kolekto — titolita: „EL STREĈITA KORDO de KÁLMÁN KALOCSAY” — kvante kaj teknike ŝajnas modesta: formato 19x14, amplekso 28 paĝoj, enhavas krom la titoldona versaĵo 10 poemojn (Mortis Grabowski, Kongresa Runo, Versoj Leoninaj, En amara horo, Iras abiturient', Ŝi amas min, Patrineco, Familiopatro, Maljuna fraŭlo, Infanoj ĉe montrofenestro). L'arta valoro de la kolektitaj poemoj tamen subpremas la senton pri modesto, kaj dum legado oni kvazaŭ sekvas la naskiĝon de l'moderna poezio Esperanta. Ĉiu, kiu interesiĝas pri altnivelaj esperantaĵoj, certe dezirus posedi ĉi tiun literature valoran eldonajon.

La liberto estas aĉetebla por prezo modera: 3 guldenoj, ĉe la libro-servo de Hungara Esperanto-Asocio.

A. H.

WILLIAM SHAKESPEARE:

SONETO LXXV

Vi estas al mi, kiel nutr' al korpo,
Aŭ dolĉaspica pluvo al terbulo,
Kaj tia lukt' min tenas en absorbo
Por vi, kiel pri l' riĉ' la avarulo
Fierplezuras, sed de tim' suferas,
Ke l' ŝtela tempo rabos lian riĉon.
Jen esti kun vi sola mi preferas,
Jen, ke la mondo vidu ĉi feliĉon.
Jen vidfestenas mi, se vin mi vidas,
Jen por rigard' mi mortas pro malsato,
Plezuron mi nek havas, nek avidas,
Krom kion donis, donos vi, amato.
Jen en mizer', jen en festen-ebrio,
Manĝegas ĉion mi, aŭ mankas ĉio.

Trad.: K. Kalocsay

Mihály Gergely

Arto de Csontváry



Memportreto de Csontváry

La organizantoj de la ĉi-jara Somera Universitato en Gyula donis la titolon al mia prelego: „Grandaj majstroj de l' pentroarto VIII.: Csontváry”. Mi jam spertis multfoje: estas tre malfacile resumi koncize en titolo la esencon de iu serioza temo, tamen nun mi tute konsentas kun la organizantoj de SEU, ĉar vere: hodiaŭ mi prelegos pri elstara, eĉ eksterordinare unika talento. Pri tia kreanto, kies arto estas vicigebla ne nur al la plej eminentaj hungaraj pentristoj, sed al la grandaj figuroj de l'pentroarto de la mondo.

Eble multaj legante tiujn vortojn miros, ĉefe se ankoraŭ ne konis lian nomon kaj almenaŭ kelkajn liajn verkojn, tamen mi povas esprimi la valoron de Csontváry per unu vorto: admirinda! Kaj tiu opinio ne estas nur la mia, sed simile taksas la grandecon de Csontváry ekzemple Lajos Fülep — la plej altkvalita hungara artkriticisto — kiu jam antaŭ jardekoj eldiris tian juĝon klare kaj kuraĝe, simile La-

jos Németh, kiu verkis la plej gravan monografion pri lia arto kaj universala signifo.

Surprize kaj juste vi povas demandi: kial oni ne sciis ĝis nun pli multe pri Csontváry? Kio povis kaŭzi, ke la amantoj de l'belarto nur en la lastaj du jardekoj komencas koni la nomon kaj arton de tiu granda majstro?

Laŭ mi la faktoroj estas la sekvaj:

1. Lia arto estis tiom alia, ol tiu de liaj antaŭuloj kaj samtempuloj, tiom originala, eksterordinara, eble ekscentra, ke lin ne komprenis la simpla publiko, nek la artkriticistoj; ne komprenis, eĉ ne emis akcepti liajn klopodojn, bildojn la kolegoj mem, ĉefe hejme en Hungario. Liaj unuaj ekspozicioj — en Hungario 1905, 1908, 1910, — en Parizo 1907 (kaj ne pli en sia vivo!) — vekis iometan atenton, sed la esperatan malkovron li ne akiris ĝis sia morto. Antaŭ jaroj mi notis aforismon pri ĉi tiu konata fenomeno, kiel memorigan devizon: „Ve por senmortulo dum sia vivo, ĉar kondamnas lin mortemuloj!”

2. Csontváry estis ne ĉiutaga homo, eĉ ne kiel junulo, apotekisto. Kiam li komencis la pentradon, lin absolute ne interesis, ke ĉe rigardado de liaj pentraĵoj kion diras la publiko, kion skribas, skribaĉas kritikistoj, kiel primokas kaj ridas, ridegas multaj kolegoj. Tiam li okupiĝis sole pri siaj kreaĵoj, pri ia misio krei senmortan verkaron. Li sen dubo estis konvinkita pri ties ebleco.

3. Certe, Csontváry estis jam dum sia produkta periodo (entute nur 15 jaroj!) iomete psikoza, sed lia malsano ĝeneraligis nur dum la lasta jardeko, kiam li kreis preskaŭ tutan sian vivoverkon! Oni povas mencii el tereno de la pentroarto de l'mondo la nomon de Francisko Goya (1746—1828) kaj tiun de van Gogh (1835—1890), kies vivo kaj sorto estis tre-tre similaj. Sed: ĉu estas ilia vivoverko malpli granda, ĉar ili fine frenezigis? Nuntempe por ni estas ĉi tiu motivo tre homa, komprenebla; forĵeti tial la vivoverkon de iu estiminda talento estus stultaĵo, maljusteco. Sed — bedaŭrinde — en la praktiko la stultaĵo kaj blindeco de la publiko multfoje iĝas tragika por artisto. Tiel same por nia Csontváry.

4. Oni devas konscii, kion signifas esti filo de iu malgranda popolo, ne potenca, ne riĉa lando, — aparteni al iu senparenca lingva komunumo, ĉefe se li estas konvinkita pri valoro de sia arto. Kiom da gigantaj talentoj de malgrandaj popoloj ne estas konataj en la mondo eĉ nuntempe pro tiu kaŭzo?!

Oni konas la nomojn kaj kelkajn poemojn de Sándor Petőfi, Endre Ady, Attila József, — kaj estas vero, ke ilia vivoverko vicigendas al la plej altaj plenumaĵoj de l' mond-literaturo. Prenu aliajn ekzemplojn el la sfero de l' pentroarto. Ĉu oni konas la nomon de Niko Pirosmasvili (1862—1918), filo de malgranda Gruzio?

Tamen lia arto estas simile altranga, kiel tiu de Henri Rousseau (1844—1910), kiun ĉiu, kiu komencas studi la pentroanton, konas kiel la plej elstaran naivan pentriston de la mondo. La sorto de Csontváry estis simila.

Mallonge iom *pri lia vivo*, pri la sorto de la homo. Tivadar Csontváry naskiĝis la 5-an de julio 1853 en Kisszeben (Transilvanio, nun en Rumanio), kaj li estis sesdek ses jara, kiam mortis la 20-an de junio 1919 en Budapeŝto. Dum siaj junaĝaj jaroj li estis komercisto, poste lernanto en apoteko de sia patro. Tiam li iĝis studento en universitato de Budapeŝto. Tiutempe li studadis la montaran flaŭron de alta Tatro (nun en Slovakio), okupiĝis pri kemio, geologio, kristalografio, pri analizo de koloroj de suno, pri difino de kemiaj kombinaĵoj. Tre serioze li esploris bredadon de la bombikso, proponante perletere ĝin al la financministro kiel ne elĉerpeblan monfonton por Hungario. En 1875 li jam estis diplomita apotekisto. Post soldata servado, li denove vizitis universitaton por studi ŝtadadministradon. Kiel juna soldato partoprenis la savagadojn en Szeged dum la granda inundo. Tiam li malsaniĝis kaj por saniĝi li veturis al Nord-Hungario inter la grandiozajn altajn montojn, kaj li iĝis apotekisto en urbo Iglo (nun en Slovakio). Li ripozis, laboradis, kaj travagadis la ĉirkaŭaĵon, studante la belegan naturon, la homojn kaj bestojn.

Foje en simpla posttagmeza horo, starante ĉe la fenestro de apoteko, li ekvidis kamparanon, side dormetante sur ĉaro, trentirita de bovinoj — kaj aŭbrupte li prenis krajonon kaj komencis desegni la scenon. Kiam pretiĝis tiu unua produktaĵo, lia ĉefo ekkriis malantaŭ li: „Kion vi faris? Ja vi estas denaska pentristo!”

„Mi staris surprizita — skribis li poste en sia biografio —, mi sentis, ke okazis io eksterordinara: kaj mi estis tre feliĉa. La desegnon mi metis en mian poŝon, mi ekpaŝis al la strato, kaj dum mia promonado ekscitite plu rigardadis la grafikaĵon. Kaj tiam mi aŭdis iun voĉon klare: „Vi estos la plej granda pentristo de *plein air* en la mondo, vi estos pli granda ol Rafaelo!”

Estas grave, ke kiam li aŭdis tiun halucinan profetaĵon, li estis jam 27 jara.

Kaj komenciĝis la streĉita laboro, la prepariĝo al la granda misio. Li komencis kopii grafikaĵojn de aliaj, kaj baldaŭ skizi la naturon. Estis bonŝance, ke lia ĉefo jesis ĉion. Csontváry skribis leterojn al tiam fama profesoro de l' belarto, Gusztáv Kelety, sendis kelkajn el siaj grafikaĵoj. Sed la leteroj perfidis, ke Csontváry nenion sciis pri la pentroarto, liaj demandoj estis tro naivaj. La respondo estis ĝentila, sed sincera: „Viaj desegnoj similas al la unuaj eksperimentoj de 10—12 jara infano.” Tamen la elreviga respondo jom ne kapablis haltigi lin, — feliĉe por la artistorio.

Dum la sekvaj jaroj li nur desegnis, pentradis, kaj por la unua grado de metoda studado li veturis en printempo de 1881 en Romon. Estas facile imageble, kial. Jes: li devis koni la nesupereblan rivalon, Rafaelon! Kaj la efiko? — Tiel il konfesis pri tiu travivaĵo: „Mi studadis la galerion de *Rafaelo*, sed la ekstazo eĉ tie ne venis!... Do mi paciĝis pri mia sorto: ja nun mi sciis, kial mi devos iĝi pli granda ol Rafaelo! Ekde tiu momento malaperis la lasta ero de mia hezitado, mi estis kvazaŭ granda militestro, kiu nur morgaŭ volas observi la predon...”

Kaj dum pluaj studentaj 15 jaroj li lernis la manieron de la pentroarto: en *München* apud la talenta Simon *Hollósy* — sed nur ses monatojn! — poste en Parizo, sed jam nur kelkajn semajnojn! Kaj sekvis Svisio, Italio, Hungario kaj denove Italio, Dalmatio,

Nord-Hungario. Tiel pasis 12—15 jaroj (atingante sian 42-an jaron!), kiam naskiĝis la unuaj tiaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj, kiuj estis jam tipaj Csontváry-aj verkoj. Kaj inter ili jam ĉefverkoj!

La mondo de Csontváry

Fine ion pri la plej karakterizaj trajtoj de lia arto. Li naskiĝis en sama jaro, kiam *Van Gogh*; samtempulo de *Munkácsy* ĝis *Picasso*, de la romantiko, realismo kaj impresionismo ĝis florado de la kubismo, ekspresionismo kaj surrealismo: *tio estis lia epoko*. Li vidis en la muzeoj de Eŭropo senmortajn bildojn far majstroj de la renesanco kaj tiujn far la plej novaj artistoj; li studadis lertaĵojn de la metio en la artlaboroj de famaj pentristoj, kaj dum la studaj 15 jaroj li povis sperti, kion postulas krei ion ne sensignifajn. Do li bone sciis: kia estas la granda pentroarto, kie loĝas la Dio en belarto — kiel oni kutimas diri; tiel li sukcesis krei la vivoverkon, indan je atento kaj estimo de la postepoko de la tuta homaro.

La malvasta kadro ne sufiĉas por analizi liajn laborometodon kaj pentran manieron. Rigardu liajn bildojn (en nia revuo); post la supra skiza portreto oni jam komprenos la sekreton de la ĉefverkoj de Csontváry.

Mi citis la vortojn de mistika voĉo, laŭ kiu Csontváry devis superi Rafaelon. Kaj li pretiĝis al la giganta entrepreno, lernis kaj laboris ekde la profetaĵo, por ke lia misio sukcesu. Lin absolute ne interesis tradiciaj temoj kaj metodoj, sensignifaj aŭ simplaj vidindaĵoj. Lian fantazion okupis nur eksterordinaraj temoj kaj travivaĵoj; tial li pentris la *Aĵtan Tatron*, la *Taorminan grekan teatron*, *Libanajn cedrojn*, la vidindaĵojn de *Baalbek* kaj *Jerusalemo*, ks, ĉar lin interesis la grandaj problemoj kaj plenumaĵoj de la homaro, de la kulturhistorio.

Liaj bildoj ne tial kapablas sugesti, agiti nin, ĉar ankaŭ iliaj dimensioj estas ofte eksterordinaraj, kaj ne nur tial, ĉar iliaj koloroj kaj kolorskaloj estas same ne kutimaj, tamen ravigaj. Parte-parte jes, sed estas la kompleksa efiko de la Csontváry-bildoj, kiu pleje motivas, ke oni rigardas tiujn pentraĵojn ravite kaj plezure.

Ĉu ni provu respondi al la demando, kiu sekvas logike post la halucinacio de Csontváry: ĉu li sukcesis iĝi pli granda ol Rafaelo? — En la sfero de artoj la komparo, la almezurado ne estas taŭga metodo — se temas pri originalaj talentoj. Ilia vivoverko estas suverena, nekomparebla, ĉar aperas kiel unika, neripetebla kaj neimitebla fenomeno de homa genio. Guste tial restas iliaj ĉefverkoj senmortaj, dediĉitaj al la eterneco.

Ni citu fine la vortojn de la menciita eksperto Lajos *Fülepy*:

„Tiaj pentraĵoj, kiaj „Ĉe la plendmuro de Jerusalemo”, „La puto le Maria”, „La soleca cedro”, aŭ „Pilgrimaĵo al la cedro”, „La ruinoj de la greka teatro en Taormino” — por atentigi nur pri la plej grandaj — estas egalrangaj al la plej grandiozaj kreaĵoj de la tuta verkaro de pentroarto —, ekde la grotbildoj de *Altamira* ĝis suproj de la nuntempa arto... Kaj kiu kreis tiujn bildojn, estas fenomeno de granda signifo ne sole en siaj lando kaj jarcento, sed en la tuta artistorio.”


Jen skiza portreto de granda pentristo. Mi kredas kaj esperas, ke — helpe de speciala ebleco de nia lingvo kaj movado Esperanto — tutmonde multaj ekkonos la nomon kaj magian arton de tiu majstro. Kaj kiu veturos al Budapeŝto, vizitu la palacon de Hungara Nacia Galerio, kaj nepre veturu al urbo Pécs por vidi la Csontváry-Galerion, dediĉitan al lia verkaro — kaj ricevi neforgeseblan travivaĵon, kiun donas liaj plej bonaj bildoj.



Csontváry: La Savanto

Akademiano Béla Köpeczi, vicĉefsekretario de Hungara Scienca Akademio, rememoris pri la internacia konferenco de la hungara Lit. Societo en 1931, kiun partoprenis inter aliaj Benedetto Croce kaj Van Thiegen. La hungaraj scienculoj atingis jam gravajn rezultojn pere de la marksisma metodo, kies plej signifa reprezentanto estis György Lukács, la fama filozofo kaj estetikisto. Grava entrepreno estas nuntempe prilaborata internacie: „La kompara historio de literaturoj de Eŭropaj lingvoj”, kies ideo venis de hungaraj scienculoj. Same, la hungaraj Szabolcsi kaj Vajda redaktas de post 1973 la plurlingvan revuon de tiu scienco, la „Neohelicon”. Dum la kongreso estis ekspozicio en la Hungara Scienca Akademio pri eldonaĵoj de libroeldonejoj Akadémia kaj Corvina.

Csontváry: La ruinoj de Taormina teatro



Pentrita tombokelo el la Romia epoko estis esplorigita en urbo Pécs. Unika monumento de grandiozaj artaj kaj sciencaj valoroj — laŭ F. Fülep, ĉefdirektoro de Hungara Nacia Muzeo. Kiam restaŭristoj igis puraj ties murojn, aperis admirindaj figuraj freskoj. Simile grandmezuraj kaj rimarkindaj freskoj estas videblaj nur en katakomboj de Romo. En la tombo troviĝis ankaŭ tri sarkofagoj kaj kelkaj romaj moneroj, per kiuj estis determinebla la epoko de la entombigo, ĉar la plej malfrua monero devenas el la jaro 375.

* * *

La fame konataj porcelanoj de fabriko Herend, estas ekspoziciitaj eksterlande, okaze de la 150-a datreveno de ĝia fondiĝo. La fabriko prezentis en Vieno en septembro, en Zuriko en oktobro siajn tradiciajn kaj novajn produktaĵojn. Post tiuj en la Germana Fed. Respubliko migranta ekspozicio vizitis la urbojn Hamburgo, Frankfurt kaj Munster.

* * *

Por Usonaj profesoroj apartan sektion organizis la Hungara Sciencpopulariga Asocio (TIT) dum la 18-a Somera Universitato „Amikeco de popoloj” en Pécs. El Ohio alvenis 54 universataj profesoroj por pasigite dek tagojn. Konvene al ilia interesiĝo, ili unuavice konatiĝis kun la hungara publika instruado.

* * *

La nova vilaĝmuzeo (skanzeno) apud urbo Szombathely estas jam preta. La interesa kolekto situas sur 2 hektaroj, kien el la departemento Vas el 22 vilaĝoj estis translokigitaj 30 vilaĝaj domoj, devenantaj el la 18-a kaj komenco de la 19-a jarcentoj.

* * *

Okaze de 450-a jarreveno de la katastrofa malvenko de la hungara armeo apud la vilaĝo Mohács kontraŭ la invadanta turka armeo, la Hungara Televido farigis dokument-filmon.

Helpe de fakuloj, la filmo rekonstruas detalojn de la gravega batalo, okazinta la 29-an de aŭgusto 1526, esploras la ĝis nun ne precize konatan terenon de la batalplaco. Tiutempe la sultana turka imperio — ankaŭ pro sia firma unueco — forte superis la feŭdan hungaran ŝtaton kaj ekonomie kaj per militforto. Pere de malnovaj mapoj kaj historiaj fontoj, la filmo ĝustigas tradiciajn erarojn pri strategio kaj taktiko de la du kontraŭaj armeoj. Aerfotoj apogas konstati la batalplacon, kie pereis plimulto de la hungara armeo, ankaŭ la juna reĝo mem. La sekvoj estis tragikaj: La iam potenca hungara ŝtato disfalis: la plejparto estis okupata de la sultana imperio dum du jarcentoj, la cetera estis iom post iom subigita de la Habsburga imperio.

* * *

Imre Szabó akademiano, direktoro de Stata Jurscienca Instituto de la Hungara Scienca Akademio estis elektita prezidanto de Internacia Jurscienca Asocio, okaze de estrarkunsido en Hamburgo.

Felîcan Novjaron!

Al ĉiuj karaj legantoj la Redakcio de Hungara Vivo deziras ĉion bonan en la nova jaro, kaj multajn sukcesojn en la vivo, en la laboro.

Aperis itallingva antologio: „Hungaraj poetoj en la 20-a jarcento”. La volumo enhavas 110 poemojn de Kosztolányi, A. József, Radnóti, Illyés, Weöres kaj I. Vas; redaktis Umberto Albini. En Romo la tiea Hungara Akademio kaj la Libroeldonejo de Itala Radio kune prezentis la libron al la publiko, kies intereson vekis forte la prelegoj de T. Klaniczay, hungara akademiano, profesoro ĉe Roma Universitato, prof. Giovanni Raboni kaj U. Albini.

* * *

En la Scienca Universitato de Varsovio jam de 24 jaroj funkcias la hungara katedro. Ĉiujare anoncas sin ĉe la katedro duoble pli da studentoj, ol estas akcepteblaj. El inter la finstudintoj pluraj laboras en Hungario ĉe polaj agentejoj, aliaj en Pollando ĉe hungaraj institucioj, ankaŭ ĉe polaj ĵurnaloj, eldonejoj, radio-televido kaj vojaĝoficejoj.

* * *

Por memoro de la hungardevena franca komponisto József Kozma oni estigis fonduson en Nico. La vidvino de la komponisto, Lily Kozma en sia testamento heredigis al la konservatorio en Nico ĉiujn rajtojn pri komponicioj de J. Kozma. Inter ili estas la fama kanto „Falanta arbofolio”, kies honorario estas ĉiujare 180 mil fr. frankoj. Kozma komponis ankaŭ multajn filmmuzikojn, kies honorariojn konstante ricevos la muzikfonduso. El la enspezo oni aĉetos novajn orgenojn kaj fortepianojn, donos stipendion al junaj komponistoj kaj muzikistoj, krome ebligas por ili studvojaĝojn.

* * *

La Asocio Internacia por Literaturhistorio Kompara (AILC) en Budapeŝto aranĝis en aŭgusto sian kongreson. Ekde 20 jaroj la Asocio ĉiun trian jaron kunsidas en diversaj landoj. La lasta kongreso en Kanado jam decidis pri la nuna diskuto de tri ĉeftemoj: la literaturo de la renesanco, de la klerismo kaj de la jarcento-turno. Krom tiuj, la kongreso pridiskutis laŭ hungara iniciato la novajn naciajn literaturojn ekster Eŭropo, kaj iliajn interrilatojn kun mondliteraturo de la 20-a jarcento. El 46 landoj 500 scienculoj partoprenis la kongreson.



Csontváry: La araba instruisto

En la urbo Kecskemét, la Muzikpedagogia Instituto „Kodály Zoltán” ricevis altvalorajn dokumentojn. Kálmán Nádasdy dirigente donacis al la instituto sian tutan kolekton, havanta multajn unikaĵojn. La alia donacinto estis la filino de Pál Bodon, iama direktoro de la muziklernejo en Kecskemét. Pál Bodon kune kun Béla Bartók kolektis popolkantojn en Transilvanio (nun en Rumanio). En la riĉa heredaĵo estas troveblaj leteroj kaj manskribitaj notkajeroj de Bartók kaj Kodály. Cetere, kun granda sukceso finiĝis la IV-a Kodály-seminario kun 130 partoprenintoj. Krom la hungaroj, el 12 landoj alvenis muzikinstruistoj por sin perfektigi en la fama Kodály-metodo.

Tr.: Szilárd Bálint

Csontváry: Antaŭ la plendmuro en Jerusalemo



Medioprotektado — monda problemo

Verkis d-ro FERENC LÁSZLÓ,
ĉefsekcestro de OVH*

I.

Oni sciiĝas preskaŭ ĉiutage pri novaj rekordoj, teknikaj mirakloj, kiuj estas naskitoj de la scienca-teknika revolucio. Tiuj sciigoj tamen alportas ne nur ĝojon, sed ankaŭ malĝojon se ni pripepensas, ke sukcesoj de tia karaktero kunportas, kiel kroman produktajn, multobligon de mediaj nocioj ombrantaj nian vivon.

La industriizado, poste la elformiĝo de la maŝina grandindustrio kaj fine disvolviĝo de la epoko de sciencteknika revolucio eksterordinare akcelas la naturtransforman agadon de la homaro, kio alportas parte utilajn rezultojn por la socio. Samtempe en kontinue pligrandiĝanta kvanto aperas la simptomoj de la „homfarita medio” nocaj laŭ homa, biologia kaj fiziologia vidpunktoj.

Laŭ mallonga analizado de la momenta situacio estas konstateble, ke la detruigo de la natura medio estas spertebla preskaŭ sur la tuta loĝebla tereno de nia Tero. En la evoluantaj industriaj landoj estas trovebla natura medio hodiaŭ jam sole en naturprotektitaj distriktoj, en naciaj parkoj. Efektive ni ne povas trovi naturan medion eĉ en praarbaroj plene fermitaj antaŭ la civilizacio, nek en altaj montaroj, dezertoj kaj en la polusaj regionoj, ĉar la diversaj atmosferaj polucioj, la bruefiko de averturadoj, ktp rezultis jam ankaŭ sur tiuj teritorioj ioman denaturiĝon. Speciale nocaj efikoj atingas la oceanojn, en kiuj ekstermiĝo de iuj animaloj kaŭzis ŝanĝon en la originala biologia ekvilibro.

Ni pensu nur pri la industria kaj agrokulturaj nocaĵoj, pri la oleo-nocadoj kaŭzitaĵoj de ŝipoj, per precipe de ujsipoj, tiam disiĝas tiuj imagaĵoj, per kiuj Fritz *Bade* esperis solvi la nutrajzorgojn de la homamasoj — sin kubut-puŝantaj pro la demografia eksplodo — per la animalaro de la oceanoj. Kaj tre malfaciliĝas la eblecoj gajni trinkakvon per la sensaligo de la marakvo.


La detruigo de la natura medio en la industrie pleje evoluantaj landoj, — do tie, kie la materiala-teknika kondiĉaro por plena disvastiĝo de scienca-teknika revolucio — atingis tian nivelon, kiu jam estas por la homaro biologie ne nur malfavora, sed

en multaj kazoj vivdanĝera; ĝi malbonigas la socian ĝeneralan farton, malpliigas la efikecon de aktiveco de laborantaro kaj ilian sanstaton. Tiel en multaj rilatoj ĝi kontraŭas la esencan celon de la scienca-teknika revolucio: ĝi efikas kontraŭ la formiĝo de vere homa vivo.

En la nunaj tagoj tutmonde estas spertebla la sindefendo kontraŭ la nocaj efikoj de la industria civilizacio, tamen oni devas konstati, ke en multaj rilatoj grandiĝas la interspaco inter la okazigitaj nocoj kaj la rezultoj de la disponoj por forigi tiujn. En rilato, speciale al nociĝoj de aero kaj akvoj, la tendenco de observeblaj faktoj montras, ke se oni neglektas la dispoziciojn, nun ankoraŭ eblajn, oni devas kalkuli pri formiĝo de ne inversigebla procezo tuŝanta la tutan biosferon, kaj tio povas konsekvenci la ĉeson de kondiĉoj de homa ekzistado. Tiajn problemojn povas kaŭzi disfalo de la Tera oksigenekonomio, la polucio de akvoj kaj grundo, por montri nur kelkajn realajn danĝerojn. Bedaŭrinde kune kun la evoluo de la tekniko povas kreski ankoraŭ la danĝerfontoj, ĉar antaŭ enkonduko de nova teknologio plej ofte ne okazas eksperimentoj por konstati la eblajn nocojn, kiujn povas kaŭzi ĝia enkonduko, adapto.

Alia, pleje okulfrapa aspekto de la detruigo de la natura medio estas la urbanizado. La invado de la provinca loĝantaro en la urbojn dum la lastaj kelkaj jardekoj okazis en tiel granda mezuro, ke ne sufiĉis la disponebla tempo eĉ en la plej antaŭzorgemaj socioj kaj komunumoj por dispozicioj regulantaj konforme la sanitajn, socialajn, urboreguladajn kaj konstruadajn kondiĉojn. Tial la urbanizado rezultis ne sole la poluciadon de la atmosfero kaj akvo de la urboj, sed aperis nereteneble specialaj efikoj de la urba vivo, kaj nun la forigo de la urbaj ruboj, forjetindaĵoj, kaj la trafikadaj problemoj produktas nocaĵojn por la socio. En 1900 la 13% de la Tera loĝantaro loĝis en urboj. Se la takto de la nuna urbanizado daŭros plu, en j. 2000 antaŭvideble 55% de monda homaro estos urbano.

*OVH: Országos Vízügyi Hivatal (Hungarlanda Priakva Instituto)



Kloakakvujoj en Tapolca

Kune kun la impeta urbanizado estos simile rapida la socia transtavoliĝo kompare kun la antaŭaj epokoj, tiel la natura aklimatizado de la homo jam plej ofte ne povos kompensi la efikojn premantajn lin pro la ŝanĝo de la socia medio. Ĉi tie ni aludas unuavice la problemon de milionoj, kiuj vivintaj en vilaĝa medio poste inundis la urbon.

Sen detala pritraktado de la problemo ni devas paroli pri tiu danĝero, kiun kaŭzas tio, ke la ŝanĝinta faka strukturo, la laborcirkonstancoj kaj vivmaniero pretendas preskaŭ nur la funkciadon de la cerbo kaj de nervaro, sed apenaŭ tiun de la movorganoj, de muskoloj kaj ost-organismo. Tiu vivmaniero, nekonvena al la natura konstruiteco de la homa organismo, kaŭzas perturbojn en la fiziologiaj funkcioj de la organismo, kaj kaŭzas longan serion da tipmalsanoj en sociaj dimensioj.

Evidentas, ke la nocajn efikojn de la denaturita medio ni povos ĉesigi, malgrandigi, resp. anticipi nur tiam, se ni malkovros kondiĉojn de ilia ekesto, esploros tiujn perajn kanalojn, tra kiuj tiuj nocaj

efikoj atingas la homan socion. Surbaze de tio ni prilaboras kaj efektivas serion da dispozicioj laŭplanaj kaj harmoniigitaj en mondaj mezuroj. Solvon de la problemo en multaj kazoj obstaklas politikaj, militistaj, strategiaj interesoj, kaj ekonomiaj interesoj de iuj grupoj.

La disvolviĝo de la scienca-teknika revolucio postulas, ke kiel eble plej frue ni prilaboru tiun akordigitan sistemon de scienca, teknika-ekonomia kaj socia disponadoj, por preventi la sekvojn danĝerajn por la sano kaj socio. Nur ĉe tiaj kondiĉoj estas atendeble, ke uzante la eblecojn de socia-teknika revolucio estu ŝanĝeblaj la koloniigaj cirkonstancoj en intereso de la urbaniza procezo kaj en la konstruado, urba trafiko, ktp.

Dum la homa evoluado en longaj epokoj ĝis nun ĉiam estiĝis ekvilibro inter la teknika evoluo kaj la homa medio. Tamen en nia jarcento la dua scienca-teknika revolucio tiom akcelis la evoluadon, ke kompensiga efiko de la socia sindefendo ne kapablas paŝi samtakte aŭtomate kun tiu procezo. En

niaj tagoj estas necesa konscie direktita agado, ĉar aŭtomata socia rekono de la danĝeroj ĝenerale okazas nur kun longa malfruo.

Hodiaŭ la rilaton de ekonomia kaj media evoluiĝo karakterizas dialektiko de kontrasto kaj de komplikeco, kompletigantaj unu la alian. La koneksiĝo de homa vivo kaj de biosfero estas kompleksa, komplikita kaj multfaceta. La ĉi-rilatajn taskojn ni povas kalkuli sole per mult-disciplina alproksimado. Unu aŭ du sciencaj konceptoj en si mem ne povas atingi daŭran rezulton. Gravas, ke ĉe komunaj fortostreĉoj la alproksimigo estu ĉiam humanca. La plej urĝa tasko estas, ke la socia ekologio kaj la medio-ekonomio laŭeble frue trovu la komunan vojon. Civilizacio estas bezonata, eĉ kune kun multe pli evoluinta tekniko ol la nuna, sed tio devas esti ekologia, kaj adaptiĝu sen ekskuiĝo al la biologia sistemo de nia Tero. La internaciajn antaŭenpaŝojn sekvu dispozicioj validaj en monda nivelo, kiuj estu rekonstruaj, poste statkonservaj. Sur la vojo kondukanta al universalaj homaj interesoj ne

forlasebla peranta ĉenero estas la regiona kunlaboro de najbaraj landoj.

Krom ĉi tiuj ni tenu antaŭ la okuloj, ke koncerne la efikojn aktivantajn la naturan medion ni estas respondecaj ne nur al la prezenco, sed ankaŭ al la formiĝo de la futuro. Estas bezonata cirkonspekta antaŭvido ĉe ĉiu decido, kiu en iu rilato havos iun efikon je nia medio, — ĉar sen tio povas esti tre nocaj la sekvoj. Oni devas ja ĝenerale anticipi la damaĝojn kaj nur poste kuraci.

Tiajn dispoziciojn, — kiujn povas sekvi malfavora ŝanĝo en la natura ekvilibro —, oni devas prepari per analiza multflanka esporado kaj kompleksa kontemplado — surbaze de logiko de koneksoj inter kaŭzo kaj sekvo. Ĉiam ni devas pripensi, ke la difekto de la ekvilibra stato sur iu teritorio — eĉ se tio ŝajnas relative bagatela — povas alporti ege grandan efikon similan al ĉenreakcio.

Ĉefprincipo estas ankaŭ tio, ke oni ne povas efektiviĝi la organizadon de taskoj koneksaj kun la medioprotektado —, sen aktiva kunlaboro de la socio. La medioprotektado devas prezentiĝi sur tuta

En la kanalo — malpurajoj de l'sukerfabriko ...





Malomtó — Apudmueleja lago en Tapolca

tereno de nia aktivado, ni devas ĝin organike enkonstrui en nian ĉiutagan agadon. Ĝi devas ĉeesti en la ĉiutago de la teorio kaj scienco, devas iĝi organika parto de la scienca esploro, kaj eĉ ne kiel apartigita doktrino, sed kiel parto de ĉiu esplora temo. Samtio rilatas ankaŭ la produktadon, ĉar sur ties preskaŭ ĉiu tereno naskiĝas mediaj nocoj kaj tial oni devas en la organiza kadro de la produktado fari disponojn por anticipi, malpliigi naskiĝon de tiaspecaj nocoj.

La medioprotektado devas esti akcentita ankaŭ sur terenoj de instruado kaj popolklerigado, komencante de la elementa instruado ĝis la universitata, kompreneble ankaŭ en la perfektigaj studformoj. Nur tiel ni povas relative baldaŭ atingi, ke la medioprotektado konkeru lokon por si en la publika pensado.

En nia erao dise en tuta mondo venis la medioprotektado en la centron de la interesiĝo kaj iĝis komuna zorgo de la tuta homaro. Tion pruvas elokvente sekvaj konstatoj de la Eŭropa Sekureca kaj Kunlabora konferenco en Helsinki laŭ la ferma dokumento subsribita en 1975. 08. 01. el kiu ni citas:

„La partoprenantaj Ŝtatoj,
konfirmante, ke en intereso de la vivantaj kaj

de estontaj generacioj, la protektado kaj plibonigo de medio, krome la racia utiligo de medioprotektadaj kaj naturaj energifontoj estas grandsignifa tasko el vidpunkto de la bonstato de popoloj kaj de ekonomia evoluado de ĉiu lando —, krome ke nombraj mediaj problemoj precipe en Eŭropo estas efike solveblaj nur per strikta internacia kunlaboro —, rekonante, ke ĉiu partoprenanta lando, laŭ senco de la internacia juro, en spirito de la kunlaboro, devas fari tiajn dispoziciojn, ke la agadoj sur sia teritorio ne kaŭzu mediajn nocojn en aliaj landoj aŭ sur teritorioj troviĝantaj ekster limoj de sia nacia superregado,

prijuĝante tiel, ke iu ajn media politiko povas esti sukcesa sole tiam, se la protektadon de la medio kaj ĝian plibonigon ĉiu grupo de la loĝantaro kaj ĉiuj sociaj fortoj akcelas, konsciante sian respondecon, kio bezonas kontinuan kaj profundan klarigan laboron, precipe en rondo de la junularo,

konfirmante, ke laŭ la spertoj la ekonomia evoluo kaj la teknika progreso devas akordiĝi kun la taskoj de la medioprotektado kaj de la konservado de historiaj kaj kulturaj valoroj, —



Loĝkolonio konstruita laŭ principoj de medioprotektado

krome per anticipaj disponoj oni povas plej efike eviti la mediajn damaĝojn, kaj oni devas gardi la ekologian ekvilibron dum la ekspluatado de la naturaj energifontoj kaj dum la mastrumado per tiuj,

ili samopinias precipe rilate sekvajn kunlaborajn celojn:

— ili studas, klopodante solvi, tiujn problemojn mediajn, kiuj laŭ ilia karaktero estas de naturo plurflankaj, duflankaj, regionaj aŭ subregionaj, — krome ili instigas la evoluigon de la kompleksaj sciencaj klopodoj por solvi la mediajn problemojn;

ili faras pli efikaj la naciajn kaj internaciajn disponojn direktigantajn al protektado de medio per la komparo de metodoj por informkolektado kaj analizado, kaj kie estas konsilinde, per ilia akordigo, per plimultigo de la konoj rilatantaj la problemojn de mediopolucio kaj de racia utiligo de la energifontoj, — krome per helpo de prilaboro de terminologio pri inform-interŝango, komparo de la nocioj kaj — laŭ ebleco — pri komuna medioprotektado;

ili faros la necesajn disponojn por alproksimigo de la medioprotektada politiko kaj, kie estas laŭcela kaj kie eblas, tiun politikon akordigi;

ili instigas, kie eblas kaj estas konsilinde, la naciajn kaj internaciajn fortostreĉojn de siaj interesitaj organizaĵoj, entreprenoj kaj firmaoj, kun la celo, evoluigi, fabriki kaj modernigi instalaĵojn por protekti kaj plibonigi la medion, kaj por observi ĝin.”

La cititaĵoj konvinke pruvas, kiel granda respondeco estas dise en la mondo sur la nun vivanta generacio en tereno de la medioprotektado. La solvendaj problemoj estas tre multifacetaj, kio originas el tio, ke la estiĝintaj mediaj damaĝoj etendiĝas sur vasta rondo.

En sekvaj ni trarigardos la plej gravajn el inter tiuj.

Akvopolucio

En nia epoko tutmonde multobligis en egaj dimensioj la polucio de riveroj, lagoj, maroj, kio estas

tial maltrankviliga, ĉar pro tio danĝerigis unu el la plej gravaj elementoj de nia ekzisto. Nome vastajn terenojn de nia vivo kaj mastrumado eble eĉ unusola faktoro de la naturo ne tiom penetris, kiom la akvo.

Vana estas la supermezura akvoamaso de la Tero — 1,3 miliardoj da km^3 —, se el tiu nur 0,5% estas la senpere utiligebla dolĉa akvo, kies signifa parto en nia erao jam estas poluita. La polucio ŝanĝas en ĝia esenco la animalaron de akvo kaj krom tio la homan medion en strikta kaj malstrikta senco.

Kiujn nocojn povas krei la akvopolucio, la malekvilibriĝo de akva vivo? Ni povas respondi tiun demandon, se ni inspektas kelkajn terenojn de utiligo de la akvo. La akvo estas medio grava por la vivo, nemalhavebla kondiĉo de ĉiuspeca vivo. Ankaŭ la homo pli facile toleras la mankon de nutraĵo, ol tiun de la akvo. Ĉe iu grado de la soifo, — kiu grado estas diversa ĉe la vivuloj —, ĉiu alia bezonaĵo ŝoviĝas al la fono.

Ne estas facila afero kontentigi la „soifon” de industrio, ĉar la pretendoj salte kreskas, sed la akvoprovizoj estas limigitaj.

Eĉ la agrokulturo, produktanta vivajn „varojn”: faŭnon kaj flaŭron, — ne povas ekzisti sen akvo.

La polucio nocanta la akvojn estas ankaŭ noca por la agrokulturo.

La akvo ludas gravan rolon en la homa vivo ankaŭ kiel faktoro en la refreŝiga feriado.

La homo ne deziras restadi longe en kalvaj regionoj, dezertoj, karstaj altaĵoj, des pli oni sopiras la vivon apud lagoj situantaj en pentrinda regiono, apud riveroj abund-akvaj, borderitaj per arbar-zonoj. Al ripoziga ĉirkaŭaĵo sin turnas la homo pro estetikaj pretendoj. Ĉio, kio ofendas estetikajn sentojn — tiel la poluita, malpura akvo — efikas misagordige. La refreŝiĝo kaj ripozo en tia ĉirkaŭaĵo iĝas celperdinta, la homo ne kapablas senzorgiĝi, senligiĝi.

En tiu tempo, kiam la akvojn atingita, homdevena polucio ne transpaŝis la limojn filksitajn de la naturo, la akvokvalito ne kaŭzis zorgon. Je la akvokvalitaj problemoj alvokis la atentojn la multobliĝo de la loĝantaro, ĝia akumuligo en la urbojn kaj la koncentrita apero de poluakvoj, kun ampleksiĝo de granddimenziaj epidemioj. La tiamaj fortostreĉoj por plibonigi la cirkonstancojn de higiena akvoakirado, por desinfektado de akvo, kaj malpli por lokigi la poluakvojn kaj purigi ilin.

La organizita akvokvalit-protektado elvolviĝis kune kun la amasa poluiĝo de akvoj. La ekzistiĝo de fabrika industrio, evoluado de urboj, radikala ŝanĝo de vivcirkonstancoj rezultis la impetan altiĝon de la kvanto de akvouzado kaj kun tio grandigon de la masoj de poluakvoj kaj variecon de ĝia konsisto. La poluiĝo de riveroj en kelkaj industriaj regionoj de Eŭropo iĝis jam komence de nia jarcento tiel grandmezura, ke ĝi iĝis malhelpilo por la plua evoluado ankaŭ pro la limigo de akvoprovizado. En la periodo de la industria ekprospero ĉiam



Velboatoj sur la lago Velencei-tó

pli kaj pli eniĝis la protektado de akvokvalito en centran problemaron de la akvomastumado. La eksplodsimila apero de socia neceseco de akvokvalit-protektado estas kompleksa rezulto de reciproka efikado en la industria produktado, en vivcirkonstancoj kaj vivpretendoj, kaj higienaj postulaĵoj.

La defendado kontraŭ la polucio de akvoj estas en ĉiu akvokolektejo longa ĉeno de disonoj, kiuj komenciĝas ĉe la uzinoj per nacia akvomastumado, per elpreno de defalajaj materioj el la poluakvoj, per surloka akvo-manipulado kaj finiĝas per konstruado de poluakvojn purigaj instalaĵoj kaj per la sennoca lokigo de la purigitaj poluakvoj en la naturan ĉirkaŭaĵon. Kune kun ĉi tiuj aranĝaĵoj — tie, kie la dispozicioj estas certigitaj — oni devas konsideri la konstruadon de akvoproviza reto de akvokolektejoj, aŭ la provizoran periodan poluakvo-kolektejon, kiuj helpas, ke la akvoj povu akcepti sen nocoj la purigitajn kaj ellasitajn poluakvojn, aŭ almenaŭ kun la plej malgrandaj malutilaj konsekvencoj, — kaj tion ĝuste en tiu tempopunkto, kiam estas plej granda la ŝarĝo-kapacito de la akceptaj akvoj.

(Daŭrigota en la sekvanta numero.)

Tr. A. Pechan

Lappar, la Antikristo

(Belartaj Konkursoj 1976, Originala prozo, Unua Premio)

Ili vagadis ĉiam kune, kvarope. Ili estis nek pli, nek mapli bravaj, ol la ceteraj bubaĉoj de tiu epoko.

— Ni faru vetkuron — kriis Lappar — Repo, Nodo, Tupy, ni kuru senŝue sur la stoplejo!

— Senŝue ne eblas — diris Tupy sobre — ĉar la urtikoj vundos la piedojn.

— Tupy, vi havas malbonan haŭton, kaj vi havas malbonan sangon. Via sango estas certe nigra. Vi estas fatraso, kaj vi hontas pro via nigra sango.

Tupy senvorte ekkaŭris kaj komencis deŝnuri la ŝuojn.

— Hurrah! — kriis Lappar. — Mi estas la vento kaj mi muĝas super la kampoj! Repo, Nodo, Tupy, ankaŭ vi estas vento. Ni kuregas kiel tempesto super la kampoj. Ni zumegu! Ni estas la ventego kaj tondre kuregas super la kampoj!

Ili kriĉante atingis la transflankan sulkon.

— Mi estis la unua! — deklaris Lappar. — Mi estas la triumfanto!

Ĉiuj sidiĝis sur la tero. La ceteraj observadis siajn piedojn kun acida mieno.

— Rigardu, Lappar! — diris ribele Tupy. — Mia sango ne estas nigra. Mia sango estas ruĝa, kiel la via!

— Miaj piedoj eĉ ne sangas — fanfaronis Lappar, ne atentante pri la vortoj de Tupy. — Mi havas bonan dikan haŭton, via haŭto estas maldika, kaj vi ĉiuj estas fatrasoj. Nun ni kuru reen, kiel la ŝtormo.

La ceteraj stariĝis malinkline.

— Ni estas la timeginda armeo — kriegadis Lappar. — Tupy, vi estas la vicestro, Repo kaj Nodo, vi estas la soldatoj. Hurrah! Ni vadu en sango!

Ili revenis tien, kie restis la ŝuoj. Tiam jam sangis eĉ la piedoj de Lappar. — Mi estas Lappar, la Demonulo! — Li kaptis grandan nesolidan terbulon, — Mi pistas ŝtonon sur mia brusto! Rigardu! — La terbulo disfalis, kiam ĝi batiĝis al la brusto de Lappar. — Pistu ankaŭ vi ŝtonojn sur via brusto. Frakasu ŝtonojn kaj kantu! Ni estas la venkintoj kaj ni dancas triumfan dancon. — Kriĉante ili dancis per la doloraj piedoj, dumane ŝutante terbulojn kaj ŝtonetojn sur sian korpon. Ili fariĝis malpuraj de kapo ĝis piedoj.

— Mi estas Lappar, la Demona Estrego. Ni vadis en sango kaj ni triumfis. Ni disrompadas ŝtonojn sur niaj brustoj. Triumfo kaj gloro! — Tiujn vortojn li kriis fiksante siajn okulojn kun provoko rekte en la sunon.

* * *

Ili vagadis laŭ la bordo de la rivereto.

— Ni kaptos fiŝojn — diris Lappar.

— Bonege, fiŝkaptado! — ĝojis Tupy. — Ni ŝtelos hokojn kaj tranĉos stangetojn.

— Mi bezonas nek hokon, nek stangeton. Mi kaptos fiŝojn per la nudaj manoj — vadis Lappar jam en la rivereto. Li kuris inter la fiŝojn, kiuj ripozis en la malprofunda akvo. Ĉirkaŭ liaj maleoloj brilis arĝentkoloraj ŝaŭmkronoj. La akvo ekbolis pro la fuĝo de la fiŝoj. Per fulmrapida movo li kaptis en la akvon, kaj jen, ĵetita fiŝeto jam flugis brile al la bordo.

— Mi kaptos por vi multegajn fiŝojn. Karasojn, ezokojn kaj karpajn. Hodiaŭ ni ĉiuj manĝos fiŝojn ĝis krevo.

La ceteraj ekinterbatalis por la predo, sed la sekva viktimo jam estis ĵetita. — Hodiaŭ mi kaptos ĉiujn fiŝojn el la rivereto! — li kuradis tien kaj reen en la vibranta akvo, furioze persekutante la fiŝojn, kaj ĵetis al la bordo la baraktantajn kaptitojn.

— Ĉu ĉiu havas jam sufiĉe? — li vadis eksteren el la rivereto, tenante en sia mano konvulsiantan beston. — Ĉu vi jam manĝis? — li demandis, kun subite severiĝanta mieno.

— Antaŭ ol rosti ilin? — demandis Tupy naŭziĝante.

— Jes ja, sen rostado, hodiaŭ ni manĝos vivantajn fiŝojn. Rigardu! — Kaj li jam tenis antaŭ sia buŝo baraktanton. La ceteraj horore gapis lin. Li ekridaĉis: — He, tamen ne! Hodiaŭ mi ne deziras fiŝon. Sed hodiaŭ en la vilaĝo ĉiu kato vespermanĝos karasojn, ezokojn kaj karpajn. Surstangigu ilin sur salikvergo! Rigardu, tiel — Kaj ŝirinte branĉeton li montris, kiamaniere oni povas surstangigi la fiŝojn, pikante tra ilia blanko kaj buŝo. Poste li reekis al la rivereto. — Rigardu, kiom da fiŝoj restis ankoraŭ! Mi kaptos ĉiujn! Hodiaŭ mi ekstermos

cion vivan en la rivereto! Hodiaŭ ĉiu kato voros fiŝojn ĝis krevo. — Kaj li daŭrigis la mortigadon, tiel abunde ĵetadante la predojn, ke la ceteraj apenaŭ povis surstangigi ilin.

Ekscititaj pro la febro de mortigado, Repo kaj Nodo kriegadis: — Plu! Ankoraŭ pli! Ĵetadu Lappar! Vi estas la Mirinda Fiŝkaptisto!

— Mi estas la Demonda Fiŝ-ekzekutisto! — kriis Lappar, ne laciĝante en la ekstermado.

Tupy rigardis lin, kun ĵaluza malamego.

Baldaŭ ili ekkuris al la vilaĝo, svingante la vergojn fetorantajn.

— Hodiaŭ estos festo por la katoj. Fiŝ-vespermanĝo ĝis krevo! Kata dimanĉo, haleluja!

— Haleluja, haleluja! — Ĥoris la ceteraj.

Eĉ Tupy kriadis kun ili.

* * *

Ili vagadis per du bicikloj. Lappar veturigis sur sia biciklo Repon, Nodon veturigis Tupy. Ili atingis la monteton „Kocor”. Ĉi tie la kampvoĵeto estas tiel kruta, ke eĉ Stefano Ĉuha ne kapablas venki ĝin, kvankam neniu konas pli fortan homon, ol lin.

— Ĉiu descendu — komandis Lappar.

Ili haltis en la sunbrilego.

— Tupy, nun residiĝu kaj veturu sur la monteton — diris Lappar kun insida rideto.

— Tio ne eblas — kontraŭdiris Tupy. — Neniu kapablas veturi ĝis la supro.

Lappar fiksis siajn ladjolorajn okulojn al Tupy.

— Ek, antaŭen. Mi venos tuj post vi, kaj se vi haltos, mi surpasos vin. — Kaj lia minacanta mi-eno pruvis, ke li ne ŝercas.

Tupy kapitulaciis. Li ekiris.

— Vi restu ĉi tie — ĵetis la vortojn Lappar al Repo kaj Nodo — sed eĉ moveton mi ne vidu, ĉar hodiaŭ mi estas danĝera.

Tion dirinte ankaŭ li ekis al la monteto.

— Klopodu Tupy, ĉar mi venas! Klopodu, se vi volas savi la vivon! Klopodu, alie mi mortpremos vin! — kriegadis Lappar.

Tupy obeis. Liaj dentoj grincis. Ekventurinte tuj li sentis, ke neniam li kapablas atingi la supraĵon. Poste ĉio ruĝiĝis antaŭ liaj okuloj. Poste li pensis, ke prefere li haltos, lasos sin mortpremi, ŝajne hodiaŭ li devas pereji neeviteble. Poste tamen li atingis la supraĵon. Ankaŭ Lappar tuj post li.

— Brave, Tupy! Bravege! — laŭdis lin Lappar kun sarkasma ridaĉo. — Nun ekiru reen, ni kunportos ankaŭ la ceterajn.

Tupy ne povis eĉ respondi. Li ekruliĝis malsupren per sia veturilo.

Repo kaj Nodo sorĉite gapis la proksimiĝantojn, kies ĉemizo estis malseka kaj kies vizaĝo estis kovrita de ŝvito, kiel tiu de la malliberulo, kiujn ili kaŝrigardis en la ŝtonminejo.

Tupy forpuŝis la biciklon kaj sternis sin teren. Ankaŭ Lappar haltis. — Mi estas la Demona Estre-

go! Tupy, vi estas la vicestro. Repo kaj Nodo, vi estas la soldatoj. Tupy, nun ek antaŭen, kunportu Repon. Mi portos Nodon, tuj malantaŭ vi. Se vi haltos, mi mortpremos vin.

— Mi faros nenion — diris Tupy sen forto. — Prefere mi mortaĉos tuj, ĉi tie. Mortpremu min tuj, ĉi tie.

Li ĵetis sin dorsen, disetendante la brakojn.

Lappar fiksis siajn okulojn al li. Lia rigardo estis flamo. — Ĥkiru, mi ordonas!

— Ne kaj ne! — skuis la kapon Tupy elĉerpita, kuŝante inter la herboj.

Lappar eltrovis ion novan: — Vi estas la vicestro. Ĥkiru sola! Mi sidigos Repon antaŭ min sur la biciklon, Nodon malantaŭ min, sur la pakajlokon, kaj ni venos post vi. Hodiaŭ mi estas timegenda kaj neebla.

La ceteraj obeis, kvazaŭ narkotitaj pro la perforto.

Tupy rezignante ekveturis, Lappar sekvis lin kun sia duobla ŝarĝo. Ĉi-foje li ne kriadis. Stertorante li spiris, liaj okuloj cirkulis freneze, liaj lentugoj brilis sub la ŝvito, kiel ardaĵoj. Neniu kredis, ke ili transvivos la aferon tamen ili alvenis sur la supro. Tiam la pulmo de Lappar jam ŝiradis la aeron kun ŝrikanta spirego. Nun li ĵetis sin dorsen, liaj okuloj rigidiĝis, kaj li fariĝis senvorta por kelka tempo. La ceteraj ĉirkaŭstaris lin sorĉitaj.

Poste Lappar ekparolis. Mallaŭte kaj raŭke: — Mi estas la Antikristo. Jen, mi pereas. Sed antaŭ mia morto mi faras mian testamenton. Aŭskultu min, ĉar mi volas, ke ĉio estu tiel post mia morto. Miajn okulojn ne fermu. Kun malfermite rigidiĝintaj okuloj mia kadavro estu portota sur la promontoron. Repo, al vi mi testamentas la vilaĝon. Nodo, via estos la arbaro. Tupy, viaj estos la rivereto kaj la fiŝoj. Se mi jam estos sur la promontoro, Repo, bruligu la vilaĝon. Estu tiam nokto kaj bruligu ĉiun domon unuope. Nodo, vi bruligu la arbaron. Ĉiun arbon kaj arbuston unuope. Tupy, vi bruligu la rivereton kaj la fiŝojn...

Tupy volis interrompi lin konsternite, sed Lappar ne lasis.

— ... se Antikristo mortas, tiam eĉ la akvoj povas bruli. — Li spiradis iom, poste daŭrigis. Se jam brulos ĉio, vi ĉiuj kolektiĝu sur la promontoro kaj tranĉu vian gorĝon. Morte mi volas vidi per miaj nefermitaj okuloj ĉion flamanta kaj sanganta. — Tion dirinte li endormiĝis.

La ceteraj kaŭris ĉirkaŭ li kun timego.

— Ĉu li jam mortis? — demandis susurante Repo.

— Ne. Aŭskultu. Li spiras ankoraŭ. — Tupy respondis tion, la vicestro.

Ili silentis longe, tre, tre longe, ĉar jam krepuskiĝis, kiam la okuloj de Lappar malfermiĝis.

— Jen la morto! — ili pensis ĉiuj kun teruro, sed ne, ĉar Lappar sidleviĝis, mezuris ilin per sia rigardo kaj diris:

— Timu kaj tremu, ĉar mi estas la Demonulo!
Timu kaj tremu, ĉar vi ĉiuj estas fatrasoj.

* * *

— Hodiaŭ ni ŝtelos melonojn — diris Lappar.

— Neeble — diris Tupy. — La kampgardistoj havas fusilojn, ŝargitajn per salo.

— Tamen ni ŝtelos — diris Lappar, iom malpli memfide.

Ili sidadis plu senvorte.

Lappar suprenrigardis al la nuboj: — Tuj pluvos. En pluvo mi ne volas melonojn. Ni ne bezonas melonojn. Prefere ni ŝtelu fusilojn kaj pistolojn. Pistolojn por Repo kaj Nodo, ĉar ili estas soldatoj. Tupy, vi ricevos fusilon, ĉar vi estas la vicedestro. Ankaŭ mi havos fusilon, sed pli grandan, ol vi. Poste ni kunpelos la kampgardistojn kaj mortpafos ilin. Ĉiun melongradiston kaj Alekson Piron. Mi ekstermos ilin, ĉar mi estas la Antikristo. Ni starigos ilin vice ĉi tie antaŭ la muro — daŭrigis Lappar. — Mi diros al unua: „Surgenuiĝu kaj petegu por via vivo. Se vi petegos bele, vi povos forkuri.” Sed vane li petegos kiel ajn bele, mi ekparolos: „Pafu!”, kaj ni mortpafos lin. Poste mi diros al la sekva gardisto: „Se vi petegos pli bele, ol la unua ĉi tie, tiam vere vi povos foriri.” Sed li petegu kiel ajn bele, ni mortpafos ankaŭ lin. Kaj laŭvice ĉiujn. Fine sekvas Alekso Piro. Mi diros al li: „Surgenuiĝu kaj se vi petegos pli bele, ol tiuj ĉi, certe vi estos la sola, kiu liberiĝos.” Tiam li surgenuiĝos kaj komencos. Mi komandos: „Petegu pli bele! Tiam li petegos pli bele. Mi postulos denove: „Ankoraŭ pli bele!” Kaj li petegos jam tre bele. Tiam mi diros: „Ĉio, kion vi diris, estas bagatelaĵo, vi forgesis ploregi, cetere vi estas fatraso kaj malbravulo.” Kaj mi diros: „Pafu”, kaj ni mortpafos ankaŭ lin.

La ceteraj aŭskultis lin kun abomeno. Kia kulpo povas ŝarĝi la animon de Alekso Piro, kial li meritos tiel teruran morton?

— Tupy, ekiru kaj rabu fusilojn. Se vi ne akiros fusilojn ĝis vespero, ankaŭ vi estos mortpafita. — Lappar eksilentis kaj profundigis en meditado. Ĉar, se Tupy ribelos kaj ne ŝtelos fusilojn, tiukaze per kio li estos mortpafita?

Poste Lappar komencis pensi pri aliaj aferoj.

— Tamen ne. Mi ne bezonas fusilojn. Prefere ni ŝtelos vinon. Ni ŝtelos vinon kaj ni ebriiĝos. Ni diboĉados kaj faros ekscesaĵojn. Mi scias, kiamaniere oni povas ŝteli vinon. Mi ŝtelrigardis, kiel faras tion la liveristoj. Nodo, via patro estas ĉarpentisto. Iru hejmen kaj ŝtelu drilon. Repo, vi rabu pumpilon de biciklo. Tupy, venu kun mi, ni trarompos la kelpordon.

Sed ili ne devis trarompi ĝin. La kelpordo ne estis fermita. Ili ŝteliris en la obtuzan malhelon kaj ĉirkaŭokulumis. Lappar subite kriis al Tupy: — Kial vi gapadas ĉi tie? Mi vidas nenion. Forkuregu kaj ŝtelu kandelon. En malhelo mi ne volas vinon.

Tupy forkuris, sed post nelonge li revenis, kaj alvenis ankaŭ la ceteraj.

Lappar komencis la laboron. Li boris maldikan truon en la barelon, sed vino ne venis el ĝi.

— Malplena — konstatis Tupy.

— Ne babilaĉu, ĉar mi arestigos vin! — kriis Lappar. Li prenis la pumpilon, kiun alportis Repo, kaj li pumpis iom da aero tra la trueto. Poste li surgenuiĝis, kaj almetante la buŝon al la truo, komencis suĉi la vinon. Kiam la soldatoj revenis, alportante ladan gamelon, Lappar jam denove pumpis. Ili metis la gamelon sub la maldikan fluon, kaj, almenaŭ ĝi pleniĝis.

— Tupy, tio estas la via, ĉar vi estas la vicedestro. Eltrinku ĝin ĝis fundo.

Tupy malinkline komencis glutadi.

— Vice ĉiu ricevos unu gamelon, kaj poste denove ĉiu po unu, ĉar hodiaŭ ni diboĉados. Ni ebriiĝos kaj faros ekscesaĵojn.

Ili stumbladis kun kapturino el la kelo eksteren. Jam pluvis.

— Kantu — komandis Lappar.

Fuŝkantante ili amblis laŭ la ĝardendorsa vojo. La griziĝanta pejzaĝo estis senviva kaj trista.

— Nun fosu mian tombon kaj enterigu min vivanta — diris Lappar. — Enterigu min kaj mi elvenos elsub la tero, ĉar mi estas la Demonulo.

Ili diskuris akiri fusilojn.

— Ĉi tie estu mia tombo — montris Lappar lokon sub granda arbo. — Faru por mi foson, mi staros en ĝin kaj vi entrigos min staranta, ĉar oni enterigas la Demonulojn ĉiam starantaj. Fosoj kaj kantu.

La soldatoj komencis fosi.

— Tupy, foriru kaj ŝtelu por mi trogon. Mi ne volas esti pluvbatata.

Poste li ekzamenis, kiom profunda estas la fosajo. Ĝi atingis nur apenaŭ ĝis genuo. Li sidiĝis teren, la ŝtelitan trogon li apogis al sia kapo kiel ŝirmilon kaj senvorte observis kantantajn tombofostojn. Ili jam staris ĝis kokso en la tero. Per manĝesto li signis: plu. Kiam la fosajo atingis jam ĝis ŝultro, li eniĝis.

— Nun enterigu min! — li donis la komandon.

Ili komencis reŝuti la teron. La loza tero atingis liajn genuojn. — Iu piedpremu ĝin. Tiel malfiksa ĝi valoras neniom.

Tupy saltis en la kavon kaj tretadis ĉirkaŭ la Demonulo. Poste ili daŭrigis la reŝutadon de la tero. Kiam ĝi jam atingis talion, ili piedpremis ĝin denove. Baldaŭ Lappar estis ĝis ŝultroj subtere, nur lia kapo kaj liaj disetenditaj brakoj restis super la tero.

— Nun kantu kaj dancu ĉirkaŭ mi. Dancu mian mortodancon, ĉar la Antikristo estas enterigita.

Dume mi elŝiros min el la tero kaj ni ekscesos senbride kaj freneze, ĉar mi estas la Demonulo.

La pluvo jam falis dense. La ceteraj ebrie ekkantis kaj ekdancis. Lappar streĉis sin. Li provis elleviĝi el la tero, per siaj disetenditaj brakoj, sed eĉ moviĝi li ne povis. La ceteraj inside atentis lin. La vizaĝo de Lappar deformiĝis, liaj helkoloraj okuloj sovaĝe cirkulis, pluveroj kaj ŝvito fluis desur lia kapo, sed vanis la klopodo, li ne povis eĉ moviĝi.

Tupy kriis al li, per voĉo nekuraĝa: — Elŝiru vin, Demonulo!

Lappar jam grincigis la dentojn pro la fortostreĉo. La ceteraj daŭrigis la mortodancon. — Haltu! — ekkriis Lappar. — Ĉiu kuru kaj kolektu por mi rubusojn. Kolorigu mian vizaĝon nigra. La nigra vizaĝo donos al mi Demonan forton.

Ili diskuris ridaĉante. Singardeme kaj rifuĝprete unue Tupy ŝmiris la vizaĝon de Lappar per rubusoj. Sed kiam ili konvinkiĝis, ke Lappar ne povas uzi siajn brakojn disetenditajn, ili plikuraĝiĝis kaj ŝmiris la nigran kaĉon pli kaj pli pasie sur la kapon de Lappar.

— Mi estas la Antikristo — kriadis li —, tuj mi elŝiros min el la tero, kaj poste mi elŝiros ankaŭ ĉi tiun arbon kaj per ĝi mi disrompos kaj dispistos vin kaj ĉion, ĉar mi estas la Demonulo!

La ceteraj dancis plu en sovaĝa gajeco, ili ĵetadis al la kapo de Lappar jam ne nur rubusojn, sed ankaŭ koton, kaj Tupy ĵetis al lia vizaĝo eĉ putrintan tomaton. — Elŝiru vin, Demonulo! Vi estas ja la timeginda! Eliĝu el la tero, se vi kapablas.

Lappar jam ne povis eĉ respondi. Nur liaj okuloj cirkulis ankoraŭ, sed liaj brakoj kuŝis apud li elĉerpitaj.

— Mi kovras vin per la trogo, por ŝirmi vin kontraŭ la pluvo — kriis la vicestro, kaj la trogo jam estis metita super Lappar.

Jam forte pluvis kaj komenciĝis la versperkrepusko.

— Ni rulu sur lin rokojn — kriis Tupy — se li estas la Demonulo, li povas deĵeti de si eĉ monton.

Per komuna forto ili alportis grandegan ŝtonon. Poste ili alportis ankoraŭ multe da ŝtonoj, brikoj, kaj ankaŭ rubaĵojn, sterkon, ĉion. La tombo de Lappar finfariĝis baldaŭ.

Unue la soldatoj ŝteliris for.

Tupy kantaĉis ankoraŭ iom, ebrie sidante sub la arbo, sed poste ankaŭ li stariĝis. — Elŝiru vin, Antikristo! — li kriis, sed nur duonvoĉe, kaj ankaŭ li ektrotis hejmen. Li sentis malbonan guston en la buŝo, pro la vino, kaj ankaŭ seniluziiĝon. „Tiu Lappar estis fatraso. Ni estus devintaj likvidi lin jam pli frue” — li pensis kaj haltis kun subita ektimo.

La tero moviĝis kaj aŭduĝis bruego. Kun teruro li hezitis, sed nur momenton. „Nenio! Oni faras eksplodon en la ŝtonminejo” — li pensis. — Morgaŭ ni iros tien kaj ŝtelrigardos la malliberulojn.

Ni kune servas la pacaferon

Intervjuo de la ĝenerala sekretario de Monda Packonsilantaro Romeŝ Ĉandra

Komence de oktobro 1976 okazis en Budapeŝto la Monda Konferenco pri Evoluo organizita de Monda Packonsilantaro, kiun partoprenis ankaŭ la delegitaro de MEM. Tiuokaze Éva Tófalvi petis la ĝeneralan sekretarion de MPT, s-ron Romeŝ Ĉandra pri intervjuo por PACO. Tiun ĉi intervjuon vi povas nun legi.

1. *En la jaro 1973 estiĝis kontrakto pri la kunlaboro inter Monda Packonsilantaro kaj Mondpaca Esperantista Movado. Kion Vi opinias pri tiu ĉi trijara periodo: Ĉu MEM sukcese kontribuis al realigo de la celoj de MPK?*

— La kontribuon de MEM en la tri pasintaj jaroj mi taksas tre alte. Estas konate, ke en 1973 ni kune partoprenis la Mondkongreson de Pacamaj Fortoj en Moskvo; depost tiam la MEM-movado evoluis kune kun la tutmonda kaj konekse kun ĉiuj gravegaj problemoj, kies solvo estas en la intereso de la monda paco, sekve ankaŭ en tiu de la senarmigo kaj evoluo. La subtenon de MEM ni ĉiam akceptis kun ĝojo kaj fiero.

2. *Kiel la esperantistoj povas plej bone servi la aferon de la monda paco?*

— La laboro, kiun la esperantistoj plenumis por niaj celoj, estis ĝis nun tre utila kaj rezultoplena. La esperantista movado, kiu estas disvastiĝinta tutmonde, plej bone kontribuas al nia komuna afero kaj en ties kadro ĝia helpo povas esti eksterordinare valora. Mi opinias, ke nia agado jaro post jaro fariĝos pli intensa, ĉar kiom la Esperanto-movado apogas nin, tiom ĝi utilas al nia movado ĝiaj laboro kaj rezultoj. Samtempe niaj rezultoj plifortigos la viajn.

3. *La gazeto de MEM estas legata ankaŭ en tiuj landoj, kie estas persekutataj la pacbatalantoj, inter ili la esperantistoj. Kion Vi mesaĝas al la esperantistoj kiuj batalas por la paco kontraŭstarante la subpremon?*

— Al pacbatalantoj kaj esperantistoj, kiuj suferas en landoj regataj de diversaj faŝismaj, neofaŝismaj kaj reakciaj reĝimoj mi povas mesaĝi, ke nia movado tago post tago disvastiĝas, kaj penetras en la tutan mondon, kaj ili ne restas solaj, ĉar ni staras apude. Precipe helpe de ĉiuj organizaĵoj de MPK, ĉiuj demokratiaj registaroj kaj movadoj, kiuj kune servas la aferon de la paco. Mia mesaĝo estas duflanka: la unuan fojon mi devas danki pro tiu batalo, kiun en malfacilaj cirkonstancoj la esperantistoj faras, duafoje mi povas certigi ilin, ke en la solidareco ni estos ĉiam unuanimaj.

Al vortekvacio, prezentita en HV 76/4. s-ro Sándor Szalay veterana esperantista-presisto donis bonan ideon: ludi ĝin en formo de rebuso. Ekzemple: kial nomis esperantistaj presistoj la prostituitinojn *litografinoj*? — Ĉar ili estas grafinoj en la lito...

Ni dankas la ideojn kaj kontribuojn de niaj ludemaj legantoj. Venontjare ni ludos plu. Inter la ĉi-numere menciitaj kunludantoj — per lotumado — libropremion gajnis: s-ro Tibor Papp kaj s-ro Ignacy Piwowarski. La librojn ni alpoŝtigis.

FERI

KALENDARO

1896—12—02 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Jaume Grau-Casas, kataluna esperantisto, poeto, artradukisto. Li redaktis kaj plejparte tradukis la belan volumon „Kataluna Antologio.”

1901—12—05 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Werner Karl Heisenberg, Nobel-premiita germana fizikisto, priskribanto kaj aplikanto de la kvantum-mekaniko, bazo inter aliaj de la moderna atomfiziko.

1901—12—06 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Nikolao Hovorka, aŭstra esperantisto, verkisto kaj redaktoro. Li estis kunlaboranto de „Literatura Mondo” dum ĝia dua periodo.

1876—12—09 Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Sam Jansson, sveda esperantisto, ĉefredaktanto de „Sveda Antologio.”

1936—12—10 Antaŭ 40 jaroj mortis Luigi Pirandello, Nobel-premiita itala dramverkisto, novelisto kaj poeto.

1866—12—21 Antaŭ 110 jaroj naskiĝis István Tömörkény, hungara verkisto, arkeologo kaj scienculo. Vidu HV 67/3.

1866—12—24 Antaŭ 110 jaroj naskiĝis William Bailey, angla esperantisto, kunredaktoro de nova eldono de „Fundamenta Krestomatio”. Li estis Akademiano kaj plurloke piednote korektis ĝin laŭ la moderna lingvo-uzo.

1937—01—03 Antaŭ 40 jaroj mortis Aladár Komját, hungara komunista poeto. Vidu HV 61/1.

1892—01—06 Antaŭ 85 jaroj naskiĝis Péter Veres, hungara verkisto, publicisto kaj politikisto.

1847—01—16 Antaŭ 130 jaroj naskiĝis Kálmán Mikszáth, hungara verkisto. Liajn plurajn novelojn publikigis HV. Vidu la enhavtabelon de HV 71/2.

1897—01—21 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Eŭgeno Miĥalski, soveta esperantisto, poeto, redaktoro kaj kunlaboranto de multaj laboristaj gazetoj. Komp. L. Rieth

Sensaciaj libronovajoj!

Kiel anoncote en la numero 1976/4 de nia revuo, Hungara Esperanto-Asocio eldonas libroserion. La libroj de la serio estas la jenaj:

1. Ferenc Szilágyi: *Koko krias jam!* (Originala nocelaro, 200 p.)
2. Lajos Tárkony: *De paĝo al paĝo* (Eseoj pri literaturo, 120 p.)
3. Auld—Dinwoodie—Francis—Rossetti: *Kvaropo* (Originalaj poemoj, 250 p.)
4. Julio Baghy: *En maskobalo* (Originalaj unuaktaĵoj, 120 p.)

La unua libro, *Koko krias jam!*, aperis meze de decembro, kaj la ceteraj tri eliros laŭ regula ritmo plej malfrue ĝis 1977—06—30. La kvar libroj estas aboneblaj por favora prezo, kaj ĉiuj abonintoj ricevos ilin tuj post la apero per poŝta livero al sia hejma adreso.

Hungaroj provas aboni la serion por 150,— forintoj, pagante la sumon per la kutima ĉeko de HEA (n-ro 516-10005). Sur la ĉeko oni ne forgesu

SAKO

„Gens una sumus” — Unu ĝento ni estas

Rubrikestro: d-ro Jozefo Németh


3-a numero

Ferenc Fleck

(Budapest)

— originala —

Novjara karto — 1977.



Mato en 2 movoj (Bl. komencas)

Bl.: Re5, De4, Ta4, Th6, Kf2, Ĉa6, Ĉd8, c3, c4, d2, d5, e2, (12)

Ng.: Rb6, Te3, Kd7, Kh2, a7, c6, f3, f4, (8)

Limdato de la solvo: 10—01—1977. (Sur la koverton: „SAKO”) La solvo de la 2a problemo: 1.Ĉe7!

Ĉe la 1-a problemo la diagramo ne estas bona! La littersignoj estas bonaj!

SUKCESO! Dum la XV. Ŝakfestivalo (Kalocsa) estis ankaŭ renkontiĝo de esperantistaj ŝakludantoj. Partoprenis el 4 landoj 25 E-ŝakludantoj! (Sovet-Unio, Mongolio, Ĉeĥoslovakio, Hungario). En la nomo de la gvidantaro de EŝLI Ladislav Fiala sekretario (Ĉeĥoslovakio) salutis la renkontiĝon kaj partoprenantojn. D-ro J. Németh informis pri laboroj de EŝLI, Hungarlandaj kaj Kalocsa-aj esperantistaj ŝakludantoj.

Esperanta Ŝak-Grupo Hungarlanda fondiĝos! Informiĝi eblas ĉe la rubrikestro (6300 Kalocsa, Szabó J. u. 3.).

Ŝak-leksikoneto (3)

EŝLI = Esperanta Ŝak-Ligo Internacia. Formiĝis en jaro 1958, la inicianto estis Sven Ziegler el Kopenhago. EŝLI havas: prezidanton, honoran prez.-n, sekretarion, kasiston, turnirgvidanton, redaktoron, du revizorojn, reprezentanton ĉe ICCF. En 27 landoj funkcias EŝLI-perantoj. En Hungario: Johano Károlyi, 5600 Békéscsaba, Landler J. u. 12. EŝLI aranĝas turnirojn, festivalojn, eldonas cirkulerojn, revuon (ĉiujare 4-foje). Al EŝLI eblas aliĝi ĉe la peranto. En jaro 1978 aŭ 1979 — laŭplane — en Hungario (Kalocsa) estos Ŝakfestivalo de EŝLI. (Mallongigojn, signojn vidu HV. 1976/4. kaj 1976/5.)

skribri: „Könyvsorozat”. Ĉe ekstera aĉeto la suma prezo de la kvar libroj estos 220,— forintoj, do per la abono oni ŝparas ne malmulte...

Hungaroj povas aboni la serion por siaj amikoj en socialismaj landoj por 165,— forintoj. Ĉe tia abono oni ne forgesu skribri dorsflanke de la ĉeko la nomon kaj precizan adreson de tiu persono, al kiu oni destinas la abonon.

Esperantistoj en nesocialismaj landoj povas aboni sendante 35,— ned. gld. al la CO de UEA, samtempe informante pri sia abono al la Oficejo de HEA (H—1368 Budapest, Pf. 193). Cetere ĉe ekstera aĉeto la suma prezo de la kvar libroj en okcidenta mono estos 55,80 ned. gld.!

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

AUSTRIO: GLOBUSFINNLANDO: AKA-DÉLIBÁB FILM AND (VAZ) Höchstädtplatz 3, TEEMINEN KIRJAKA-RECORDS STUDIO, 19 1200 WIEN XX., UPPA, Keskuskatu 2, Prince Arthur Street 00100 HELSINKI 10. west, MONTREAL 130

AUSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000

COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694-696 George Street, SYDNEY N. S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Pe- tit-Ile 1070 BRUXEL- LES

OFFICE INTERNATIO- NAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPE- RANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF

COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT

THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chat- swort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MA- ĀARSKA KULTURA, Narodni Trída 22, 115 66 PRAHA I.

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRA- TISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKS- GAARD'S BOGHAN- DEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKA- DÉLIBÁB FILM AND (VAZ) Höchstädtplatz 3, TEEMINEN KIRJAKA-RECORDS STUDIO, 19 1200 WIEN XX., UPPA, Keskuskatu 2, Prince Arthur Street 00100 HELSINKI 10. west, MONTREAL 130

FRANCIO: AGENCE P.Q. LITTERAIRE ET AR- TISTIQUE PARISIEN- NE, 23 Rue Royale, PA- RIS 8.

SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXE

G.D.R.: ZEITUNG- SVERTRIEBSAMT, Strasse den Pariser Kommune 3-4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlin- strasse 10, 6 FRANK- FURT 1.

H.W.E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRI- VATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CAL- CUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamar- mora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE

SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO

INTER- NATIONAL, 100-31. NAUKA LTD., 2-30- 19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGO- SLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD

PROSVETA EXPORT- IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA SABA, Phong Phat Books P.O. Box 1017, 166 sor n

TO- HANH BAO CHI, 17 Dinh HANOI, RD

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNI- VERSALA ESPERAN- TO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROT- TERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NAR- VESENS LITTERA- TURTJENESTE, Box, 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B. K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00-840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BU- CURESTI

D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCH- TAMT-IMPORT, MOS- KVA

POCHTAMT- IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Als- trömergatan 22, 101-10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60-62, BASEL 4002

MEROPOLITAN VER- LAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Ave- nue NEW YORK, N. Y. 10003

HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11802 Buckeye Road, CLEVE- LAND, Ohio 44120.

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHA- PHONG PHAT BOOKS P.O. Box 1017, 166 sor n

TO- HANH BAO CHI, 17 Dinh HANOI, RD



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
VIII. Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1976. 6-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Feny- vesi, István László, d-ro Lajos Lesz- nai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy, Zsuzsa Varga- Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kőkény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thew- rewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoŝefoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazet- oficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H-1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses nume- roj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalva- lora sumo en alia valuto

76-4897 Somogy m. Ny. 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377




LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

La Fridujfabriko plilongigis la serion de mastrumaj fridujoj.
Jen la du unuaj tipoj de la nova produktaj-familio:

1. 160-litra, dustela-, kun 18 litra ultrafrigidejo ĝis -12°C ;
produktita surbaze de BOSCH—licenco; prezo: 5170,— Ft.
2. 200-litra, dustela, kompresora fridujo-, kun 13 litra
ultrafrigidejo ĝis -12°C ; prezo: 5640,— Ft.




Gyártja: Hűtőgépgyár



Konsumturist

Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj



Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért